


# EL POPOLA ĈINIO

中國郵票  
5 1983





# VIDAĴOJ EL LA HOŜO XI UJUMQIN


Fotoj de LI CHUNGENG

La hoŝo Xi Ujumqin de la Interna Mongolio de Ĉinio estas natura paŝtejo, sur kiu punktiĝas mongolaj tendoj kaj paŝtiĝas gregoj da ŝafoj.

Antaŭ nelonge mi vivis inter tieaj paŝtistoj kelkajn tagojn. Profitante la okazon, mi faris fotojn pri iliaj vivo kaj moroj.



Vespero en la  
hoŝo Xi Ujumqin





Reveno de pañado

Rigardado de spektaklo en Nadam-foiro




Aktorinoj de la trupo Ulanmqi de la hoŝo prezentas por paŝistoj.



Luktistoj en  
Nadam-foiro



Virinoj lertaj  
en fel-tanado



Riparado de lantapiŝo

Patrino kaj siaj infanoj



Lernantoj de elementa lernejo



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

Filatela amatoro

Foto de WANG JIANZHONG

Pekina filatelistino Zhang Liqing estas mezlernejanino. Ŝi ekfilatelis jam antaŭ ses jaroj.

## SUR LA DORSKOVRILO:

Esperantaj poŝtmarkoj

Ĉi tie estas parto de la Esperantaj poŝtmarkoj, kolektitaj de ĉina esperantisto Song Weitan. Pri la detalo bv. legi la artikolon "Mi kaj Esperanto-filatelo".

## KOLORAJ SERIOJ:

Vidaĵoj el la hoŝo Xi Ujumqin

Shizhong-monto

Fotoj faritaj de esp-istoj

Ĉinaj pladoj

Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (5)

Pentraĵoj de Dong Chensheng

## NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

"Fabriko" de rizplantidoj

Filatelistoj de Pekino

Memorigaj poŝtmarkoj

## Enhavo

Al niaj legantoj . . . . .	2
Pri ĉinmedicina kuracado:	
Kuracmetodo de la tradicia ĉina medicino . . . . .	4
Kelkaj kuracprincipoj de la tradicia ĉina medicino . . . . .	6
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj drogherboj . . . . .	8
MIA VIVO: Mia kuracista vivo . . . . .	10
Tio estas lia idealo kaj afero . . . . .	14
Budapest, la gastiganto de la 68-a Universala Kongreso . . . . .	16
POR KOMENCANTOJ: Rakonto pri paraŝuto . . . . .	18
Eminentaj verkoj el la rubriko "Fotoj faritaj de esp-istoj" . . . . .	3
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	19
Esperanto kaj internacia ekspozicio . . . . .	21
Mi kaj Esperanto-filatelo . . . . .	22
Kelkaj notoj pri la filatelo en Ĉinio . . . . .	33
Sur la vojo de riĉiĝo . . . . .	28
Abelbredado en Ĉinio . . . . .	31
La dua juneco . . . . .	23
Librovendistino (Novelo) . . . . .	36
La Unua Internacia Turisma Kongreso en Ĉinio . . . . .	38
Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (5): Pejzaĝoj sude de Jangzi-rivero . . . . .	50
VIDINDAJ LOKOJ: Shizhong-monto . . . . .	25
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Historiaj meritoj de la Tri Regnoj . . . . .	41
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Mongoloj kaj ĉevaloj . . . . .	44
ĈINAJ PLADOJ . . . . .	27
TRA LA MONDO . . . . .	48
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	13
INTER NI . . . . .	46
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	43, 46

JARABONTARIFO		Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugaliao	Esc	400	
Aŭstralio	SA	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00

# AL NIAJ LEGANTOJ

## — Pri la elektado de plej bonaj artikoloj kaj bildoj en EPĈ de 1982

Karaj legantoj,

Nia redakcio dissendis enketilon al vi kune kun la revuo, n-ro 12, 1982, por ke vi elektu la de vi plej ŝatatajn artikolojn, kovrilojn, dorskovrilojn kaj bildojn aperintajn en EPĈ de 1982 kaj rekomendu al ni po tri temojn, pri kiuj vi volas legi. Multaj el vi resendis al ni la enketilojn plenigitajn per detalaj opinioj. Koran dankon al ili. Aparte menciinda estas s-ro Aleksu Huoponen, kiu kun granda aĝo de pli ol 90 jaroj resendis al ni la enketilon.

Leginte la resenditajn enketilojn, ni trovis, ke niaj legantoj tre serioze traktis tiun aferon. Pro diverseco de profesioj kaj intereso de la legantoj la voĉdonitaj artikoloj, kovriloj, dorskovriloj kaj bildoj ampleksas preskaŭ ĉiujn, kiuj aperis en nia revuo de 1982, escepte nur kelkajn. Sed la plej alta poentaro ne superis 30 procentojn de la totala nombro de voĉdonintoj. Sube ni publikigas la titolojn de artikoloj, kovriloj, dorskovriloj kaj bildpaĝoj, kiuj gajnis pli da poentoj en la elektado.

Artikoloj pri Esperanto: “La Esperanto-movado en Ĉinio” (de Hou Zhiping, n-ro 2—n-ro 4), “Esperanto kaj la tria mondo” (de Zhang Qicheng, n-ro 5), “Kio estas Esperanto kaj kia estos ĝia estonteco?” (de Geoffrey Sutton, n-ro 6). Tiuj tri artikoloj gajnis plej multajn poentojn kompare kun ĉiuj aliaj.

Estas ŝatataj de la legantoj ankaŭ jenaj: “Vortfaradoj de Esperanto kaj la ĉina lingvo” (de Zhu Xueli, n-ro 9), “Lidia Zamenhof” (de Roan Orloff Stone, n-ro 8), “Kiel mi instruas Esperanton al ĉinaj studentoj” (de Pandišo, n-ro 10), “La rolo de estetiko en lingvouzado” (de William Auld, n-ro 1) kaj “Lingvo kaj nacia sento” (de Zhang Qicheng, n-ro 1).

Artikoloj pri Ĉinio: “Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero” (de Zheng Zhenjie, n-ro 4—n-ro 9) gajnis plej multajn poentojn, el tiu serio da artikoloj plej bonvenigataj estas “Ŝanĝiĝo en la malnova fluejo de la Flava Rivero” kaj “La antikva urbo Kaifeng”, kies poentoj okupas la kvaran lokon. Ankaŭ “De la primitiva homaro al la klana socio” (n-ro 1) kaj “Qin-regno unuigis Ĉinion” (n-ro 9) verkitaj de Ba Hong ricevis nemalmultajn poentojn. La aliaj ŝatataj artikoloj estas “La folkloro de Ĉinio” (de Zhang Wen, n-ro 4), “Mirakla kuracado” (de Yu Feng, n-ro 9), “Pri la ĉina edukistemo” (n-ro 3), “Fervojkonstruantoj sur altebenaĵo” (de Yi Ming, n-ro 4), “Atingoj en la reguligo de la ĉina nacia ekonomio” (de Zhang Wenjian, n-ro 10), “Ĉinio regas kreskon de sia loĝantaro” (de Liu Zheng, n-ro 2), “Por la sano de la popolo” (de Cui Yueli, n-ro 11), “La progreso de ĉina gimnastiko” (de Zong Chao, n-ro 4),

“Kiel aprezi ĉinstilajn pentraĵojn?” (de Lian Tong, n-ro 12), “Kiel mi servas al eksterlandaj gastoj” (de Liu Yusong, n-ro 6), “Post mia emeritiĝo” (de Ni Guangxing, n-ro 7), “Sepstela kolĉeno” (de Ge Agan, n-ro 3), “Marko Polo venis denove al Ĉinio” (de Wang Xueming, n-ro 5) kaj “En kaj ekster la malliberejo” (de Cao Bailong, n-ro 11).

Artikoloj pri internaciaj aferoj: “Detruigo de arbaro — alia minaco al la homara ekzisto” (de Jie Fu, n-ro 9), “Tom pri la monda malarmado” (de Wang Zonghe, n-ro 11) kaj “Tom pri la problemo de maljunuloj” (de Wang Renguang, n-ro 8).

Kovriloj: “En somera tago” (foto de Yan Zhongyi, n-ro 10), “Mitula danco el la baletto ‘Perla Lago’” (foto de Lao Bai, n-ro 9) kaj “Infano kaj anasidoj” (foto de Zheng Yunfeng, n-ro 6).

Dorskovriloj: “Taj-a kuracisto” (ĉinstila pentraĵo de Yao Youduo, n-ro 12), “Knabino” (ĉinstila pentraĵo de Shao Fei, n-ro 2) kaj “Diino Luo” (ĉinstila pentraĵo de Ren Shuaiying, n-ro 11).

Koloraj serioj: “La nomada vivo de kazaĥoj” (fotoj de Ren Shiyin kaj Zhu Xianmin, n-ro 5), “En la vilaĝo de dungoj” (fotoj de Wang Shouliang kaj Cai Haifeng, n-ro 9) kaj “La bujoj” (fotoj de Wang Shouliang kaj Zhou Youma, n-ro 11).



## Eminentaj verkoj el la rubriko “Fotoj faritaj de esp-istoj”

**E**N 1982 EPĈ aperigis 18 fotojn faritajn de diverslandaj esperantistoj. Ni kaj niaj legantoj elektis tri el ili kiel la plej bonajn, nome la foton “Ruĝigintaj folioj de aceroj en Kohrankei, gubernio Aiĉi” faritan de japana s-ano M. Niwa por n-ro 10, la foton “Frostiĝa akvofalo en la montaro Jatra de Ĉeĥoslovakio” faritan de hungara s-ano Szombati-Szabo Ildiko por n-ro 5 kaj la foton “Brazilaj araoj en usona parko” faritan de brazila s-ano Ivan Doretto por n-ro 10. Ni premias la tri aŭtorojn kaj dankas la legantojn, kiuj donis opinion pri la fotoj.

Ni petas, ke niaj legantoj daŭre sendu al ni fotojn por la rubriko “Fotoj faritaj de esp-istoj”. Ni premias ankaŭ tiujn kontribuantojn en la fino de 1983,

post kiam iliaj fotoj estos elektitaj kiel la plej bonaj.

**La Red.**



La fotoj “Frostiĝa akvofalo en la montaro Jatra de Ĉeĥoslovakio” (supre maldekstre), “Brazilaj araoj en usona parko” (meze maldekstre) kaj “Ruĝigintaj folioj de aceroj en Kohrankei, gubernio Aiĉi” (sube maldekstre).

Koloraj bildpaĝoj en la mezo: “Kvar sezonoj de Changbaimontaro” (fotoj de Li Li kaj Wang Ying, n-ro 7), “Pejzaĝoj de Xiandu” (fotoj de Li Chungeng, n-ro 3), “Vidindaj lokoj de Shandong” (fotoj de Zhou Dongyuan kaj Di Xianghua, n-ro 8) kaj “Guifeng-monto” (fotoj de Yang Jishou kaj Cai Haifeng, n-ro 9).

Nigraj-blankaj serioj: “Plezuroj de maljunuloj” (fotoj de Yan Zhongyi kaj Qu Weibo, n-ro 7), “En someraj tagoj” (fotoj de Yan Zhongyi, n-ro 10) kaj “Fotoj faritaj dum mia trimil-kilometra vojaĝo” (fotoj de Sun Yi, n-ro 12).

Verkoj el “Fotoj faritaj de E-istoj”: “Ruĝigintaj folioj de aceroj en Kohrankei, gubernio

Aiĉi” (de M. Niwa el Japanio, n-ro 10), “Brazilaj araoj en usona parko” (de Ivan Doretto el Brazilo, n-ro 10) kaj “Frostiĝa akvofalo en la montaro Jatra de Ĉeĥoslovakio” (de Szombati-Szabo Ildiko el Hungario, n-ro 5).

En siaj enketiloj niaj legantoj faris tre utilajn proponojn al ni kaj rekomendis temojn ampleksantajn Esperantologion kaj Esperanto-movadon, la ĉinajn politikon, ekonomion, kulturon, edukon, sciencan, sporton, higienon, historion, geografion, nacimulplimulto kaj popolan vivon kaj rilatojn inter Ĉinio kaj fremdaj landoj kaj internaciajn problemojn. El la proponitaj iuj jam estis tuŝitaj de nia revuo kaj aliaj ankoraŭ ne. Ni laŭeble

kontentigos niajn legantojn per artikoloj de iliaj ŝatataj temoj.

Ni promesis donaci ĉinstilajn memoraĵojn al la legantoj, kiuj plenigis kaj resendis al ni la enketilojn, por esprimi nian dankon. Nun ni jam elektis kompletojn da poŝtmarkoj lastatempe emisiitaj en Ĉinio kaj resendis al ili po kompletan.

Ĉi-foje la resenditaj enketiloj ne estas tre multaj, tamen ili multe helpas al plifortigo de la amikeco kaj kunlaboro inter ni kaj la legantoj. Ni elkore deziras, ke pli multaj legantoj partoprenu en tia aktivado kaj kontribuu al plibonigo de nia revuo per siaj valoraj opinioj kaj proponoj.

**La Red.**

# PRI ĈINMEDICINA KURACADO

*La ĉina medicino estas resumo de spertoj de la ĉina popolo en ĝia batalo kontraŭ malsanoj dum jarmiloj. Ĝi kontribuis al prosperiĝo de la ĉina nacio kaj ludis pozitivan rolon en disvolvo de la monda medicino. Kaj nun oni daŭre praktikas ĝin por preventi kaj venki malsanojn.*

*Nia revuo iam donis al la legantoj fundamentajn sciojn pri la tradicia ĉina medicino. Post tio multaj el la legantoj, kiuj interesiĝis pri la tradicia ĉina medicino, skribis al ni, ke ni pli detale raportu pri tiu temo. Pro tio ni petis ĉinmedicinajn specialistojn verki jenajn artikolojn, por ke niaj legantoj pli bone konu la ĉinan medicinon.*

— La Red.

PANG ZHURU:

## KURACMETODO DE LA TRADICIA ĈINA MEDICINO

**D**IAGNOZADO kaj kuracado laŭ distingado de simptomoj estas ĉefa trajto de la tradicia ĉina medicino kaj grava principo, kiu gvidas ĝian klinikan praktikon. Por kuraci malsanulon, oni unue analizas, distingas kaj konas la simptomon, kaj poste faras diagnozon. Tio estas konkreta esprimo de la terapia sistemo de la ĉina medicino en praktikado. Tiu principo estis observata por gvidi la ĉinan medicinon jam pli ol 2 000 jarojn. La praktikado pruvis, ke ĝi estas efika kaj scienca.

La “simptomo” en la ĉina medicino ne estas simpla simptomo en la kutima senco, sed enhavas ĉiujn sintezajn klinikajn fenomenojn, kiuj montras la rezistpovon de la korpo kontraŭ malsano. La ĉina medicino opinias, ke la malsano de homo estas manifestiĝo de batalo inter la pozitiva kaj negativa fortoj en lia korpo. Kiam la korpo estas invadita de la negativa forto, la pozitiva tuj faras reaktion aŭ reziston. La estigitaj fenomenoj prezentas simptomojn. Unuvorte, simptomo estas ŝanĝiĝo de la du kontraŭdiraj fortoj.

Malsamaj homoj havas malsamajn reakciojn kaj rezistpovojn kontraŭ malsano kaj malsamajn sentemojn al malsano kaj medikamento. Dum diagnozado la ĉinmedicinaj kuracistoj donas apartan atenton al reguligo de rezistpovo kaj reakcio de la korpo kontraŭ malsano. Laŭ diagnoza rezulto ili konas kaj distingas la staton kaj tendencon de malsano kaj per taŭga rimedo reguligas rezistpovon kaj reaktion de la korpo por forigi iliajn mankon, eksceson kaj malordon, kaj restarigi ilian normalan funkcion.

En la ĉina medicino estas pluraj metodoj por analizi kaj distingi la simptomojn, inter kiuj sin trovas la ĝenerala metodo distingi laŭ ok ĉefaj sindromoj. Kvankam la metodoj estas malsame uzataj, tamen ili havas rilatojn inter si. Generale, distingo laŭ la ok ĉefaj sindromoj estas resumo pri la loko kaj karaktero de malsano, pri kresko kaj malkresko de la pozitiva kaj negativa fortoj en la korpo. La ok sindromoj konsistas el la simptomoj pozitiva, negativa, aspekta, interna, varma, malvarma, hiperfunkcia kaj hipofunkcia. Bonvolu rigardi la jenan tabelon.

Simptomo	Rezistpovo kontraŭ malsano	Reakcio kontraŭ malsano
pozitiva	vigla, evidenta	aktiva
negativa	malforta. nerimarkita	neaktiva
aspekta	montrata ekstere	malprofunda
interna	montrata interne	profunda
varma	ekscesa	ekscita
malvarma	malforta	neekscita
hiperfunkcia	meza	forta
hipofunkcia	inerta	malforta

Iliaj fenomenoj montriĝas kiel jene:

**Pozitiva simptomo:** ekscitiĝo, ruĝa vizaĝo, varma korpo, varmegaj kvar membroj, emo al laŭtvoĉa babilo, forta spirado, moviĝemo, soifo kaj ŝato de malvarma trinkaĵo, konstipiĝo, ventrodoloro kaj timo al premo, dika saburo kaj forta pulso.

**Negativa simptomo:** malvigliĝo, malbrila vizaĝo, malvarma aspekto kaj malvarmaj kvar

membroj, rapida spirado, silentemo mallaŭta voĉo, nesoifo aŭ ŝato de varma trinkaĵo, ventrodoloro sed ŝato de premo, laksado, palruĝa lango, tro malseka saburo, malforta kaj malrapida pulso.

**Aspekta simptomo:** febro kun malvarmega sento, doloro de la kapo kaj korpo, ŝtopitaj naztruoj aŭ mukoellasado, tuso, maldika kaj blanka saburo, malprofunda pulso.

**Interna simptomo:** febro sen malvarma sento, aŭ ŝato de varmo kaj timo de malvarmo, palpacio, anhelado, ŝveliĝo kaj doloro de la ventro kaj brusto, konstipiĝo aŭ laksado, profunda pulso.

**Varma simptomo:** febro kun varmega sento, malpacienco, soifo kaj ŝato de malvarma trinkaĵo, konstipiĝo, malmulta flavega urino, ruĝaj vizaĝo kaj lango, flava aŭ bruna saburo kaj troa pulsado.



**Malvarma simptomo:** malvarmegaj manoj kaj piedoj, nesoifo aŭ ŝato de varma trinkaĵo, malvigliĝo, pala vizaĝo, laksado, ruĝeta lango, profunda kaj malrapida pulsado.

**Hiperfunkcia simptomo:** ruĝa vizaĝo, ekscitiĝo, forta febro, laŭtvoĉa parolo, anhelado, multa mukajo malfacile sputebla, konstipiĝo, dika saburo kaj forta pulso.

**Hipofunkcia simptomo:** pala vizaĝo, malvigliĝo, laco, palpacio, rapida spirado, spontanea ŝvitado, sensabura lango kaj malforta pulso.

(Daŭriĝo sur p. 27)

### Ĉin-medicinaj verkoj elterigitaj en tombo de Han-dinastio



# KELKAJ KURACPRINCIPOJ DE LA TRADICIA ĈINA MEDICINO

de WANG JIA'EN

**D**ANK' al sia longtempa praktikado oni resumis sperton kaj ellaboris serion da kuracprincipoj de la tradicia ĉina medicino. Tiuj principoj estas bazitaj sur teorio pri la tuteco de la ĉina medicino kaj ĝia distingado de simptomoj kaj sur fidindaj materialoj akiritaj el kvar flankoj: observado, aŭskultado, demando kaj pulsopalpado. Antaŭ kuracado la ĉinmedicinaj kuracistoj devas analizi kaj distingi la simptomojn. Nur el ĝustaj analizado kaj distingado oni povas veni al senerara konkludo pri la simptomoj, trafe preskribi medikamentojn kaj rikolti bonan

kurac-efikon. Kontraŭ malsamaj simptomoj oni devas apliki malsamajn kuracprincipojn. Ekz., oni uzas tonikan medikamenton kontraŭ la hipofunkcia simptomo kaj laksigan kontraŭ la hiperfunkcia. Laŭ klaraj kuracprincipoj oni povas ellabori konkretajn kuracprojektojn. La kuracprincipoj kaj kuracprojektoj signifas bonan diagnozon kaj ĝustan preskribon. La gravaj kuracprincipoj de la tradicia ĉina medicino konsistas el la jenaj ok:

Teorio pri la tuteco de la ĉina medicino. Ĝi traktas la rila-

ton de la homo kun la naturo, opiniante, ke la funkcioj de ĉiuj organoj de la homo estas influitaj de la naturo ĉiam kaj ĉie. Ĝi esploras la homan korpon mem, montrante, ke ĝi estas unueca organismo. Ĉiuj organoj de la homo rilatas unu kun alia fiziologie kaj influas unu alian patologie. Tiaj rilato kaj influo efikas pere de la neĉefaj organaj tuboj kun kvin internaj organoj kiel centro. Kiam interna organo malsaniĝas, tio povas influi eksteran organon, kaj kiam ekstera organo malsaniĝas, tio povas influi ankaŭ internan organon. La

*Ekzameno al malsanulo per aparato*



*Kuracado de strumo per akupunkturo*



teorio pri la tuteco traktas ankaŭ la rilaton de spirito kaj humoro de la homo kun lia korpo, opiniante, ke la troa incitigemo aŭ longtempa deprimiĝo en spirito povas influu la normalajn funkciojn de la homa korpo. La unua ĉinmedicina teoria verko «Nej Ging» montras, ke kolero malutilas al la hepato, troĝojo al la koro, meditemo al la lieno, ĉagreno al la pulmo kaj timo al la reno.

**Prevento pli grava ol kuraco.** Laŭ tiu principo oni metas sur la unuan lokon la preventon de malsano kaj malhelpon de ĝia graviĝo.

**Kuracado por forigi la ĉefajn simptomojn.** La ĉinmedicinaj kuracistoj donas apartan atenton al forigo de la ĉefaj simptomoj. Estas malpermesite kuraci sendistinge. La kaŭzo de malsano estas komplika, tial, por fari kuracadon, oni devas bone kapti la ĉefan malsanigan faktoron kaj solvi la plej bazan problemon.

**Aktuala rimedo por akuta malsano.** Se malsano minacas la vivon de malsanulo, oni devas apliki la principon unue forigi la simptomojn kaj poste kuraci la malsanon. Se la malsano ne abrupte ŝanĝiĝas, oni devas apliki la principon kuraci la malsanon mem. Se graviĝas la simptomoj kaj la malsano, oni devas forigi ilin samtempe.


**Kreskigo de pozitivaj faktoroj kaj forigo de la negativaj.** Kreskigo de pozitivaj faktoroj signifas vigligi la sangocirkuladon per akupunkturo aŭ medikamento. Oni faras tion por altigi la rezistpovon de la korpo. Forigo de la negativaj faktoroj signifas elimini ĉiujn malsanigajn faktorojn kaj ĉiujn nenormalajn fenomenojn. La eksceso aŭ malvig-

liĝo de la organaj funkcioj kaŭzita de iuj ajn faktoroj estas montriĝo de malsano. Estas multaj rimedoj por forigi malsanigajn faktorojn. Ekz., ŝvitiga metodo estas uzata por elpeli malsanigajn faktorojn el interne, vomiga por elpuŝi ilin tra la buŝo, laksiga por eligi stagnaĵon, sinteza por kreskigi pozitivajn faktorojn kaj forigi la malsanigajn, kaj varmiga por elimini malvarmon en la korpo kaj kreskigi la pozitivan forton. Oni povas apliki ilin aparte aŭ sin-teze laŭ la stato de malsanulo.

**Normala kuracado kaj kuracado per inversa trakto.** Oni faras normalan kuracadon tiamaniere: kuraci malsanon kun malvarma simptomo per varmiga medikamento, kuraci tiun kun varma per malvarmiga, kuraci tiun kun hipofunkcia per tonika kaj kuraci tiun kun hiperfunkcia per laksiga. Male al la supre dirita estas ankaŭ kuracado per inversa trakto, ekz., kuraci malsanon kun malvarma simptomo ŝajne varma per varmiga medikamento kaj kuraci tiun kun varma simptomo ŝajne malvarma per malvarmiga.

**Kuracado laŭ malsamaj malsanigaj faktoroj.** Sezono, klimato, geografia medio, humoro, nutrado kaj vivkondiĉoj, ĉiuj influas la estiĝon kaj graviĝon de malsano. En la kuracado oni devas konsideri diversajn faktorojn, konkretan analizon pri ĉiu kazo kaj ellabori taŭgan kuracprojekton laŭ malsamaj tempoj, malsamaj lokoj kaj malsamaj pacientoj, kontraŭ sama malsano oni ofte preskribas malsamajn medikamentojn, konsiderante ne nur la korpon de malsanuloj sed ankaŭ sezonon, en kiu ili troviĝas, kaj iliajn loĝlokojn.

**Malsamaj kuracrimedoj por sama malsano kaj sama kuracri-**



*Kupra modelo por instrui akupunkturon, farita en Song-dinastio*

**medo por malsamaj malsanoj.** La antaŭa signifas, ke malsamaj kuracrimedoj devas esti aplikataj por sama malsano pro ĝiaj malsamaj kaŭzoj, evoluoj kaj stadioj. Kaj la lasta signifas, ke sama kuracrimedo devas esti aplikata por malsamaj malsanoj pro iliaj samaj kaŭzo, evoluo kaj stadio. Ekz., anusoptoza, gastroptoza kaj uteroptoza povas esti kuracataj per sama metodo, t.e. kreskigi la pozitivan forton de la malsanuloj.

Unuvorte, en la ĉin-medicina kuracado oni devas observi simptomojn de malsano kaj serĉi ĝian ĉefan kaŭzon. Oni devas bone distingi la esencajn simptomojn disde la aspektaj, la gravajn simptomojn disde la malgravaj kaj la akutajn disde la kronikaj. Oni devas sekvi la suprajn ok kuracprincipojn. Tio estas tre grava por iu ajn ĉin-medicina kuracisto.

## ĈINAJ

### DROGHERBOJ

de WANG JIA'EN  
kaj HUO RUIXING

**J**AM de la antikveco la patroj de la ĉina nacio sciis uzi iujn plantojn, animalojn kaj mineralojn por preventi kaj kuraci malsanojn. Nun ankoraŭ cirkulas inter la popolo legendo pri Shennong, kiu gustumadis kuracherbojn. Shennong, sanktulo en legendo de la antikva Ĉinio, estis rigardata de la ĉina laboranta popolo kiel la unua kuracisto, kiu trovis drogherbojn kaj instruis kuracadon. Ĉar li ĝuis grandan reputacion, oni skribis medicinajn verkojn en lia nomo. La unua farmakopeo de Ĉinio aperinta en Handinastio (206 a. K.—220 p. K.) estis titolita “Shennong Bencao Jing (Farmakopeo de Shennong)”. La farmakopeo klarigas 365 drogojn, pritraktante iliajn karakteron, guston, klasifikadon, preparadon, indikon, akordan kunmeton kaj nekunmetoblecon.

La ĉinmedicinaj drogoj estas multaj, el kiuj plejparto estas herbaj kaj lignaj, tial en la antikveco oni nomis la ĉinmedicinajn drogojn “bencao” (drogherboj). Libroj pri drogoj ofte



portis la titolon “bencao”, ankaŭ la farmakologio de la ĉina medicino estis nomata “bencaologio”. Post la apero de la farmakopeo “Shennong Bencao Jing” naskiĝis multaj verkoj pri “bencao”. En la sesa jarcento aperis alia farmakopeo “Shennong Bencao Jing Jizhu”, kiu entenas 730 drogojn.


En la dekseca jarcento en Ĉinio estis granda medicinisto Li Shizhen, kiu dediĉis sian tutan vivon al farmakologio. Li kolektadis drogherbojn kaj verkis grandan farmakopeon “Bencao Gangmu” kun pli ol 1 900 000 ĉinaj ideografiaĵoj dank’ al sia 27-jara diligenta laborado. La farmakopeo traktis 1 892 drogojn kaj 11 091 preskribojn kun 1 110 ilustraĵoj. Li klasifikis la drogojn en tri kategoriojn, nome la plantan, la animalan kaj la mineralan, kaj prezentis la produktojn, formon, kolektadon, preparadon, karakteron kaj efikon de ĉiu drogo. Tiu enciklopedia verko sisteme resumis la riĉan sperton de la ĉina popolo en uzo de drogoj antaŭ la dekseca jarcento. Ĝi faris grandan kontribuon al la farmakologia disvolviĝo de Ĉinio. Se oni rigardas “Shennong Bencao Jing” kiel angulŝtonon de la ĉinmedicina farmakologio, oni devas do preni “Bencao Gangmu” kiel ĝian historian monumenton.

Post Li Shizhen aperis multaj farmakologoj, kiuj kreis malsamajn skolojn per siaj verkoj por heredi lian aferon. En la okdekaj jaroj de la dudeka jarcento, la ĉinmedicina farmakologio eniris sian novan etapon kaj la drogoj havis pli ol 5 000 specojn vaste uzatajn por la popolo. Tio montris la vivforton de la ĉina medicino kaj ĝian brilan perspektivon.

Kiel ĉiu homo havas sian karakteron, ankaŭ ĉiu ĉinmedicina drogo havas la sian. Laŭ la karakteroj la ĉinmedicinaj drogoj povas esti dividitaj en kvar kategoriojn, nome la malvarmdonan, la varmdonan, la varmetdonan kaj la malvarmetdonan. La varmdonaj kaj varmetdonaj drogoj povas forigi malvarmon; kaj la malvarmdonaj kaj malvarmetdonaj troan varmon.

La ĉinmedicinaj drogoj havas kvin gustojn, nome la acidan, la amaran, la dolĉan, la akran kaj la salan. Drogoj kun malsamaj gustoj havas malsamajn kuracifikojn. La akraj drogoj estas solvaj, la acidaj sorbigaj, la dolĉaj tonikaj, la amaraj laksigaj kaj la salaj moligaj.

La karaktero kaj gusto de drogoj decidas la kuracan efikon. Efedro, jujubo, abrikota kerno, preparita nematura umeo kaj geko estas varmetdonaj drogoj. Kun malsamaj gustoj ili havas



La poŝtmarka serio «Kuracaj herboj» (de maldekstre) (1) hemerokalo (2) fritilario (3) akonito (4) lilio (5) arisaemo (arisaema consanguineum) (6) peonio

malsamajn kurac-efikojn. Efedro kun akra gusto estas uzata por ŝvitigo, sed jujubo kun dolĉa gusto por sanigi lienon. Mento, gipso, amomo kaj akonita radiketo estas akraj drogoj, tamen ili ne same efikas pro malsamaj karakteroj. Ekz., gipso estas malvarmdona drogo por redukti varmon, kaj akonita radiketo estas varmdona por kuraci febron (ekz. ŝokon).

Iuj drogoj havas plurajn gustojn, ili do estas pli vaste uzataj en kuracado. Ekz., angeliko kun akra kaj dolĉa gustoj povas forigi malvarmon kaj revigligi sangajn organojn.

La homaj malsanoj estas komplikaj kaj variaj. Ofte okazas, ke unu malsanulo suferas samtempe de profunda kaj malprofunda perturboj, varmo kaj mal-

varmo, kaj aliaj malsanoj. Por kuraci tian malsanulon, ĉinmedicinaj kuracistoj ofte donas preskribon kun pluraj drogoj anstataŭ tiun kun unu sola.

Laŭ la kazoj de malsanuloj kuracistoj donas al ili malsamajn preskribojn, grandan, malgrandan, urĝan kaj neurĝan. Granda preskribo kun granda kvanto da drogoj kuracas gravan malsanon, malgranda kun malgranda kvanto kuracas malgravan malsanon, neurĝa kun drogoj de milda karaktero estas uzata por kuraci kronikan malsanon kaj la urĝa kun drastaj drogoj por kuraci pacienton en krizo.


La preskribo de la ĉina medicino ne signifas simplan kunmeton de pluraj drogoj, sed oni faras laŭ ilia graveco en la

preskribo. Oni dividas la drogojn en preskribojn en kvar partojn. La ĉefaj drogoj ludas gravan rolon en kuracado; la helpaj akcelas la efikon de la ĉefaj; la akcesoraj kuracas aliajn perturbojn de la sama paciento; kaj la akordigaj estas uzataj por akordigi la kunmetitajn drogojn. Ĉiu preskribo entenas ĉefajn drogojn, dum aliaj estas enmetitaj laŭ la kazo de la paciento.

La medikamentoj de la ĉina medicino inkluzivas dekoktajon, pulvoron, pilolojn kaj paston. Pacientoj trinkas dekoktajon kaj iam uzas ĝin ankaŭ por vaporizi aŭ lavi siajn vundojn. Oni faras pulvoran medikamenton el muelitaj drogoj por buŝa engluto aŭ ŝmirado, ĝi estas facile ensorbbla kaj uzata por kuraci akutajn malsanojn. La piloloj estas fari-

(Daŭrigo sur p. 10)

Ginsengo, valora drogherbo de Ĉinio



Laborantoj ordigas ĉinajn drogojn de la Malgranda Xing'an-montaro.



# *Mia kuracista vivo*

de ZHU CHENYU

*Se vi estus kuracisto, ĉu vi volonte akceptus ĉiun malsanulon, kiam vi sidus hejme post reveno de laboro, kiam vi pasigus festotagon aŭ ferion kune kun viaj familianoj, kiam vi veturus per trajno aŭ ŝipo por oficvojaĝo, kiam. . . ? Ĝuste tiel agis dum dekoj da jaroj la fama ĉin-medicina kuracisto Zhu Chenyu, estro de la ĉinmedicina sekcio de la Pekina Ĉefurba Hospitalo. Inter la pacientoj kuracitaj de li troviĝis altrangaj ŝtatoŝtatoj kaj ordinaraj laboruloj. Li traktis ilin egale varme. Nature ili vizitis lin pro lia famo. Se vi volas informiĝi, kiel li akiris tiel bonan reputacion, legu do lian jenan artikolon pri li mem.*

**La Red.**

Estas ĉina popoldiro "Homoj malofte povas atingi la aĝon de sepdek jaroj." Ankaŭ mi baldaŭ fariĝos sepdekjarulo. Mi okupiĝis pri medicino jam duonjarcenton, ekde mia 19-jara aĝo.

Mi tre amas la ĉinan medicinon kaj ankaŭ alte taksas la okcidentan. Mi energie laboras por kombini la ĉinan kaj okcidentan medicinojn. Mi opinias, ke ambaŭ medicinoj havas siajn for-

tajn punktojn, ili devas lerni unu de la alia por forigi siajn mankojn.

Oni ofte demandis min, kial mi studas la ĉinan medicinon. Mi ne povas respondi tion per simpla vorto. Mi naskiĝis en fama riz-komercista familio ne konanta medicinon. En mia knabeco mi ne havis deziron fariĝi kuracisto. Sed mia familia malfeliĉo portis al mi ĉagrenon

kaj pelis min al studo de medicino. En la jaro, kiam mi diplomitiĝis el mezlernejo, mia patrino falis en strangan malsanon en Pekino. Ŝi deliris pro febrego kaj manĝis nenion. Estis tre malfacile ricevi kuracon pro hipo-kritaj homaj rilatoj. Ifoje mi eĉ genuiĝis antaŭ kuracisto por peti lian helpon, sed ankaŭ tio ne tuŝis lin. Mia patrino prenis multajn medikamentojn preskri-

(Daŭrigo de p. 9)


taj el medikamenta pulvoro miksitaj kun mielo, akvo aŭ alia likvo. Krome estas ankaŭ kondensitaj piloloj. Oni uzas pilolojn por kuraci kronikajn malsanojn. La medikamenta pasto estas farita el akve aŭ oleo dekoktitaj drogoj por engluto aŭ ŝmirado.

La ĉinmedicinaj kuracistoj preskribas al siaj pacientoj drogojn por dekoktado, kaj la lastaj prenas varmetan dekoktajon ĝenerale. Estas konsilinde preni malvarman dekoktajon el malvarmdonaj drogoj por kuraci varman malsanon, kaj varman

el varmdonaj por kuraci la malvarman. La ĉina medicino akcentas drogo-prenan manieron, ĉar tio koncernas kurac-efikon.

Krom la supre menciita droga kuracado, la ĉina medicino aplikas ankaŭ sendrogan kuracadon, kiun mi traktos poste.





*Zhu Chenyu faras prelegon en Kantono.*

bitajn de ĉin- kaj okcident-  
medicinaj kuracistoj, tamen tio  
restis senefika. Poste ŝi kvieti-  
ĝis kaj ne plu deliris dank' al  
medikamentoj preskribitaj de la  
fama ĉin-medicina kuracisto Shi  
Jinmo. Sed fine malfeliĉo trafis  
mian patrinon. Kiam ŝi refalis  
en la malsanon, d-ro Shi jam  
oficvojaĝis al Nankino. La mal-  
sano forrabis la vivon de mia  
patrino, tamen mi vidis la for-  
ton de ĉinaj medicino kaj drog-  
herboj. Mi konvinkiĝis pri lia  
kuracarto. Mi decidis lerni de  
li la ĉinan medicinon.

Krom mi, li havis ankaŭ aliajn  
tri disĉiplojn. Antaŭtagmeze ni  
kvar faris helplaborojn por li en  
hospitalo, kiel ekzemple, noti  
malsan-staton kaj skribi preskri-  
bojn sub lia diktado. Posttagme-  
ze ni sekvis lin por viziti mal-  
sanulojn. Vespere ni aŭskultis  
lian prelegon kaj studis klasi-  
kajn ĉin-medicinajn verkojn.  
Tiel mi pasigis ses jarojn.

Fininte la lernadon ĉe li, mi  
fondis kuracejon en Tianjin kaj  
laboris kiel profesia kuracisto.

Mankis al mi sperto. Mi do apli-  
kis preskribojn de mia majstro.  
Tio rikoltis bonan efikon, tamen  
mi ne komprenis la kialon. Tiam  
la majstro proponis, ke mi legu  
okcident-medicinajn verkojn pri  
fiziologio, anatomio kaj patolo-  
gio. Tiel mi ekhavis rilaton kun  
la okcidenta medicino. Ŝajnis al  
mi, ke la okcidenta medicino  
eksplikas kaŭzojn de malsanoj  
pli bone ol la ĉina. Pro intereso  
pri la okcidenta medicino mi vo-  
jaĝis orienten al Japanio en la  
kvardekaj jaroj por ĝin studi.  
Kunvojaĝis ankaŭ Shi Yuehua,  
filino de d-ro Shi. Mi studis me-  
dicinon kaj ŝi farmacion. Ni  
geedziĝis dum tiu tempo.

Fininte la studon, mi revenis  
al Pekino kaj denove praktikis  
la ĉinan medicinon en kombino  
kun la okcidenta. Foje mi ku-  
racis filon de iu buroestro, mal-  
sanan je osta tuberkulozo kaj ne  
povantan piediri dum ses jaroj  
pro la pusa maldekstra femuro.

Mi forigis lian gravan malsanon  
per ĉin-medicina toniko kaj in-  
jektaĵo de la okcidenta medicino.  
Pro tio mi iom post iom fami-  
ĝis. La buroestro invitis min  
starigi kuracejon en lia buroo.  
Poste li estis postenigita al la  
provinco Yunnan kaj mi sekvis  
lin tien por praktiki medicinon.

En la mezo de la kvindekaj  
jaroj la ŝtato fondis ĉin-medicin-  
an instituton en Pekino por  
elkulturi fakulojn. Ĉefministro  
Ĝoŭ Enlaj esperis, ke kuracisto  
kompetenta pri ambaŭ medicini-  
noj gvidos la instruan laboron.  
D-ro Shi rekomendis min al tiu  
posteno. Tiam mi laboris en  
Xishuangbanna, Yunnan-pro-  
vinco. Malgraŭ ke oni volis rete-  
ni min en la loko, mi revenis  
al Pekino kaj gvidis la instrua-  
don pri la ĉina medicino.

Dum mia gvido super instrua-  
do mi ankaŭ kuracis malsanu-  
lojn. Ĉe la komenco de la sep-

*Zhu Chenyu (la unua de dekstre) en kuracado*



dekaj jaroj mi forlasis la gvidadon super instruado kaj okupiĝis denove pri kuracado. Mia devizo estis "rifuzi neniun venintan malsanulon". Mi aŭdis, ke deantike neniu virta kuracisto rifuzis vizitantajn malsanulojn. Ankaŭ mia instruisto Shi donis bonan ekzemplon. Li traktis la malsanulojn tute egale, ĉu ili estis riĉaj aŭ malriĉaj. Sub lia inspiro ankaŭ mi varme akceptis la malsanulojn. Mi ne plendis, eĉ kiam venis tre multaj malsanuloj. Mi estis tre okupita de gvida laboro kaj aliaj aktivadoj, pro kio mi rajtis ne akcepti malsanulojn en la ambulatorio. Instigate de kuracista devo, mi tamen laŭeble faris kuracon al pacientoj. Ĉiusemajne mi estis ŝarĝita per tro da laboroj. Mi devis ne nur plenumi administrajn aferojn, sed ankaŭ labori en la ambulatorio por kvar duontagoj, esplor-viziti enhospitaligitajn malsanulojn por unu duontago kaj partopreni en komuna diagnozo al malsanuloj farita de ĉin- kaj okcident-medicinaj kuracistoj por unu duontago. Ĉiufoje, kiam mi estis en la ambulatorio, la malsanuloj estis tro multaj, almenaŭ 60-70, iam eĉ 120. Tro ŝarĝa estis tio, ke mi devis fari preskribojn por tiel multaj pacientoj, tamen mi alkiutimiĝis. Mi ofte petis junajn kuracistojn demandi por mi miajn malsanulojn pri ilia malsan-stato kaj tion noti, poste mi diagnozis ties malsanojn kaj mia helpanto skribis la preskribojn sub mia diktado. Tiel mi bezonis nur kelkajn minutojn por diagnozi malsanon de unu paciento. Tamen mi ofte ne povis akurate fini la diagnozon kaj miaj helpantoj ege laciĝis. Ĉe tio mi diris al ili: "Malsanuloj venis de malproksime. Ni devas laŭeble fari kuracon al ili, eĉ ni

estas jam lacaj." Mi havas postenon en la ambulatorio, kaj mi devas servi al malsanuloj.

Malsanuloj venis ankaŭ al mia hejmo post mia laboro. Inter ili troviĝis altrangaj ŝtatifacistoj kaj ordinaraj laboristoj. Ekde 1972 mi kuracis ilin en mia hejmo du vesperojn ĉiusemajne, ne postulate pagon. Tiel mi forigis aŭ mildigis la doloron por dek-miloj da malsanuloj.

Ankaŭ alilokaj malsanuloj skribis al mi por konsulto. Konstatinte iliajn malsan-statojn el iliaj leteroj, mi senprokraste petis miajn helpantojn skribi respondajn leterojn kun miaj preskriboj. Dum la pasintaj ses jaroj mi elsendis pli ol 6 760 tiajn respondajn leterojn. Letere konsultis min ankaŭ malsanuloj en Hongkong kaj aliaj landoj. El ili iuj ne povis aĉeti ĉinajn drogherbojn, pri tio mi bedaŭrinde ne povis doni al ili plian helpon.

Iafoje mi oficvojaĝis per trajno, iuj sin turnis al mi por konsulto; kiam mi havis kunvenon, oni jam atendis min en ripozĉambro; ankaŭ iuj petis min kuraci malsanulojn en ties hejmoj, dum mi pasigis festotagon kune kun miaj familianoj. Kompreneble tio multe lacigis min, tamen portis al mi grandan ĝojon.

Ĉin-medicinaj kuracistoj diagnozas malsanojn per observado, aŭskulto, demando kaj pojno-pulso-palpado. La vizaĝo de homo estas spegulo de malsano. Vidante fremdan malsanulon, mi kutime direktis mian rigardon al lia vizaĝo por vidi la simptonon. La ruĝa vizaĝo montras eble hipertension; la pala vizaĝo kun ruĝaj zigomoj spegulas pulman malsanon; la flavaj okuloj vidigas ikteron; kaj

ruĝiĝo de la okuloj estas mani-festiĝo de akuta konjunktivito. Dum la observado mi ankaŭ demandas malsanulon pri la simptomoj, palpas lian pulson kaj aŭskultas liajn parolsonojn, kaj sur tiu bazo mi faras la diagnozon. Iun someron mi gvidis lernantojn al kamparo por medicina praktikado. Dume mi vidis iun malsanan viron en vatitaj vestoj, kiujn li ne povis demeti, alie li sentus ĝisoste malvarmon kaj tutkorpe malsekiĝus de malvarma ŝvito. Iuj okcident-medicinaj kuracistoj asertis, ke lin trafis neŭrozo, kaj kuracadis lin sen efiko. Konstatinte per la supre dirita metodo, mi asertis, ke li suferis malsufiĉon de vivforto kaj perturbiĝon de cirkulaj organoj, mi proponis al li trinki dekoktaĵon el kasia branĉeto, peonio, glicirizo, zingibro kaj jujuboj. Post kvin tagoj la viro demetis siajn vatitajn vestojn kaj post dudek tagoj ekportis maldikajn vestojn kiel la sanaj homoj.

Mi ofte kuracis gravajn, eĉ strangajn malsanojn senescepte per drogherboj. Foje en malsanulan ĉambron oni venigis kvar suferantojn de encefalito B, kiuj deliris pro febreĝo. Post vana kuracado tri el ili mortis, kaj la gepatroj de la lasta 19-jara junulo petis min diagnozi lian malsanon. Liaj kvar membroj estis malvarmegaj kaj lia pulso apenaŭ palpebla. Lia vivo sin trovis en krizo. Okcident-medicinaj kuracistoj preskribis al li kontraŭfebrajn medikamentojn. Male mi proponis al li ginsengon kaj aliajn varmodonajn medikamentojn. Iuj timis, ke tio levos lian temperaturon. Laŭ mi, lia febro estis falsa simptomo kaj malvarmo efektiva. Tiu ekstreme malforta malsanulo devis preni fortajn tonikojn. Kiel

## **ĈINIO EN ĜENERALA REFORMO**

Por krei novan situacion de la socialisma moderna konstruado, Ĉinio nun faras reformojn en administra strukturo kaj ekonomia sistemo. Per la reformo de administra strukturo oni volas solvi la problemojn de oficistara superabundeco, burokratismo kaj malalta laborefiko, dum la ekonomia reformo ĉefe celas elimini la postĝintajn administrajn sistemojn. Krome, envolvitaj en tiun ĉi reformon estas ankaŭ la departementoj pri politiko, juro, eksterlandaj aferoj, laboro, personaro, propagando, scienco kaj tekniko, eduko, kulturo, ĵurnalismo, eldonado, higieno, popolaj organizoj kaj ĉiuj aliaj fakoj.

## **NOVA ASPEKTO DE LA ĈINA ŜIPKONSTRUA INDUSTRIO**

Ekde sia fondiĝo en la lasta majo ĝis februaro ĉi-jare, la Ĉina Korporacio de Ŝipkonstrua Industrio akiris rimarkindan ekonomian rezulton. La totala produktovaloron de ĝia ŝipkonstruado 8.5-pocente kreskis kompare kun tiu de 1981, superinte la planitan produkton valoron je 10 pocentoj. La entreprenoj de ĝi rekte

administrataj konstruis 324 ŝipojn kun 420 000 toneloj. La nombro de la totala kapacito kreskis je 3.7 pocentoj kaj atingis la plej altan nivelon en la historio. La lokaj entreprenoj, al kiuj la korporacio asignis produktajn taskojn, konstruis 2 563 ŝipojn kun totala kapacito de 293 000 toneloj. Ankaŭ la planita tasko de ŝipriparo superplenumiĝis je 31.6 pocentoj.

Pasintjare la korporacio subskribis kontraktojn pri konstruado de pli ol 10 ŝipoj por fremdlandaj klientoj. Ĝi finkonstruis 10 ŝipojn kun 216 800 toneloj por civila uzo kaj 3 surmarajn nafto-kolektajn platformojn. La kvalito de ĉiuj liveritaj ŝipoj kaj platformoj atingis internaciajn avangardajn normojn.

## **PREVENT-MEDICINA CENTRO FONDOTA**

Ĉinio starigos prevent-medicinan centron, kies ĉefaj taskoj estos esplori la teknikan teorion kaj praktikon de preventa medicino, organizi kaj kunordigi tiuflankan scienc-esploron en la tuta lando, doni teknikan direktadon al la sanitaraj kaj kontraŭepidemiaj organizoj de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj en higiena kontrolado kaj malsano-preventado, trejni por ili fakajn laborantojn, aranĝi studon pri la difinado de higienaj reguloj, normoj kaj similaj, kolekti kaj interŝanĝi informojn pri la kontrolo kaj prevento kontraŭ epidemioj.

## **OK OBJEKTOJ DE ELEKTRONIKA INDUSTRIO PLENUMITAJ**

En la lastaj jaroj la ĉina elektronika industrio importis 8 grandajn kaj mezgrandajn objektojn de fundamenta konstruado, kaj ili ekfunkciis en 1982. Tiuj objektoj liveris al la ĉina elektronika industrio avangardajn teknologiojn kaj ekipaĵojn kaj ludas gravan rolon en la disvolvado de tiu industria branĉo.

## **LA UNUA AŬTO-FABRIKO DE ĈINIO PRODUKTIS MILIONON DE AŬTOJ**

La nomita fabriko en la urbo Changchun, kiu ekfunkciis en 1956, jam produktis sian 1 000 000-an aŭton.

Nun du trionoj de la veturantaj aŭtoj en Ĉinio estas produktitaj de tiu fabriko.

## **LA ENSPEZO DE LA ĈINAJ KAMPARANOJ KRESKIS RIMARKINDE**

Laŭ la unuapaŝa kalkulo de la Ŝtata Statistika Buroo, en 1982 la mona enspezo de la ĉinaj kamparanoj kreskis multe. La totala sumo atingis 170.5 miliardojn da juanoj, 12.3-pocente pliiĝis ol tiu en 1981 kaj superis tiun en 1978 per 77.7 miliardoj da juanoj.

En la lastaj 4 jaroj la meznombrara kreskado de la mona enspezo de la ĉinaj kamparanoj superis 5.9-oble tiun en la 26 jaroj de 1952 ĝis 1978.

estis la rezulto? Li resaniĝis post preno de la medikamentoj.

Mi volas instrui mian kuracarton al gejunuloj, anstataŭ kunporti ĝin al la tombo. Nun mi havas du lernantinojn, Jiao Yiping kaj Liang Xiaochun. Ili ambaŭ iam studis en altlernejo. Mi postulis, ke ili kune kun mi esploru unue diabeton kaj

poste ginekologiajn malsanojn kaj lernu ĉe mi tri jarojn por ordigi kuracajn dosierojn. Kiam venis nova malsanulo, mi ordonis, ke ili unue faru diagnozon kaj preskribon kaj poste donu la skribajon al mi por kontroli kaj revizii. Lernantoj ne povas tuj atingi la nivelon de sia instruisto, tial mi postulis, ke ili unue imitu kaj poste asimilu

mian kuracarton kaj esperis, ke ili superos min. Krom ili, mi instruis ankaŭ miajn gefilojn kaj bofilon. Ili jam fariĝis kompetentaj kuracistoj. Mi forte esperas, ke nia Zhu-familio deveninta de riz-komercista familio fariĝos de nun kuracista familio kaj servos al la popolo per kuracarto generacio post generacio.

# Tio estas lia idealo kaj afero

## —Pri Esperanta instruisto Yu Guojian

**I**UN tagon mi samtempe ricevis du leterojn, en kiuj estis enmetita po unu ekzemplero de la ĵurnalo «Anhui Ribao», kiu raportas pri Esperanta instruisto Yu Guojian. La sendintoj estis liaj lernantoj. Ili esperis, ke ankaŭ El Popola Ĉinio prezentos liajn farojn al la publiko.

Leginte la leterojn, mi refoje jetis mian rigardon sur la nomojn de la skribintoj: Zhang Yuan kaj Wang Xigeng.

Wang Xigeng loĝas en kamparo kaj ekriatiĝis kun Yu per

korrespondado. En 1978 li malsukcesis en la enira ekzameno al universitato, kio kompreneble kaŭzis al li grandajn ĉagrenon. Iutage li informiĝis pri Esperanta aktivado el radiodissendo. Li pensis: “Se mi ne povas viziti altan lernejon, ĉu mi ne povas memlerni Esperanton?” Li skribis al la Anhui-a Esperanto-Instituto por peti helpon. Post nelonge Yu Guojian, kiu laboras en la instituto, sendis al li longan leteron, en kiu li donis al li ĝeneralan klarigon pri Esperanto

kaj varme kuraĝigis lin bone lerni la lingvon.

De tiam li eklernis Esperanton per korrespondado kun instruisto Yu. Tio daŭris du jarojn. La junulo prezentis multajn demandojn al la instruisto en siaj leteroj, kaj tiu ĉi donis ĉiam detalajn respondojn. Kiel por aliaj multaj lernantoj en malproksimo Yu aĉetis ankaŭ por li Esperantaj lernolibrojn kaj referencajn materialojn per sia mono.

Dum instruado per korrespondado Yu renkontis multajn malfacilojn, tamen li ĉiam trovis bonan solvon. Ekzemple, por instrui la prononcadon de la 28 literoj de Esperanto Yu faris detalan klarigon pri la prononcmanieroj kaj komparis ilin kun la similaj internaciaj fonetikaj simboloj kaj han-lingvaj fonetikaj literoj. Dank’ al tio Wang Xigeng pli facile plenumis la lernadon.

Por disvastigi Esperanton Yu ne ŝparas siajn fortojn kaj monon, pro tio li estas multe respektata de gejunuloj. En la tuta lando estas pli ol 200 gejunuloj, kiuj estas instruataj de li kiel Wang Xigeng. En la lasta pli ol unu jaro li skribis pli ol 2 000 leterojn al siaj lernantoj kaj donacis al ili lernolibrojn, por tio li elspezis grandan sumon da mono.

*Yu Guojian helpas Zhang Yuan (la unuan de dekstre), Wang Xigeng (la trian de dekstre) k.a. en lernado de Esperanto.*




De 1978, sub lia helpo fondiĝis unu post alia Esperanto-asocioj en Bengbu, Huainan, Hefei, Wuhu, Fuyang kaj Anqing kaj dekelkaj Esperantaj kursoj aŭ grupoj en Anhui-provinco. De 1982 li gvidas la progresigan Esperantan kurson en la Anhui-a Universitato kaj la Esperantan kurson de Hefei. Krome li funkcias kiel vicsekretario de la Anhui-a Esperanto-instituto kaj vicprezidanto de la Bengbu-a Esperanto-Asocio. Li ĉiutage laboras ĝis profunda nokto. Foje, venis al li junulo el alia loko por peti lian helpon, sed pro granda okupiteco Yu Guojian havis tempon por helpi lin nur en nokto. Poste la junulo skribis al li: "Vi estas mia unua instruisto de Esperanto, kaj mi neniam forgesos viajn sincerajn konsilojn dum mia tuta vivo."

Yu Guojian ne domaĝas tempon por kulturi junajn esperantistojn, sed domaĝas ĝin por viziti kuraciston. Li suferas de hipertensio kaj spasma de vizaĝa

nervo kaj kuracistoj multfoje donis al li ateston pri forpermeso por ripozo, sed ĉiufoje li rifuzis tion. En la komenco de 1982, kiam li gvidis Esperantan kurson en Hefei, lia edzino malsaniĝis kaj devis veturi al Ŝanhajo por ricevi operacion. En la unua tagdeko de februaro la hospitalo telegrafis al li, ke li veturu al Ŝanhajo por subskribi ateston de la operacio. Pro okupiteco li veturis al la hospitalo en la fino de februaro. Subskribinte la ateston, li tuj revenis al Hefei. La malsano de lia edzino maltrankviligis lin, sed lia amata afero ne permesis al li perdi tempon.


Yu Guojian estas mentoro kaj sincera amiko de gejunuloj. Li dediĉis sian valoran tempon kaj tutan energion al kulturado de junaj esperantistoj. Eble oni demandas: Kial Yu Guojian volantas esti ĝardenisto kulturanta junajn esperantistojn? Lia respondo estas: "Tio estas miaj idealo kaj afero."



*Yu Guojian skribas respondajn leterojn al siaj lernantoj.*



*Yu Guojian kun siaj lernantoj*



# Budapest, la gastiganto de la 68-a Universala Kongreso

*Flora Loh*

**L**A ĉefurboj ĉiam okupas elstaran lokon en la koncernaj landoj. Mi, kiel loĝanto de provinca urbo, sentas, ke nia Budapest (Budapeŝt) estas ĉe tro granda por malgranda lando kia Hungarujo estas. La nombro de la enloĝantaro en nia ĉefurbo jam superis du milionojn, do ĉiu kvina hungarlandano vivas en Budapest. Por komprenigi la diferencojn inter ĝi kaj niaj aliaj urboj sufiĉas mencii, ke la dua plej granda hungara urbo Miskolc (Miŝkolc) havas nur 250 mil enloĝantojn.

Budapest estas la centro de la hungara kultura vivo, ĝi donas pli ol duonon de la tutlanda industria produkto. El Budapest


disradias la ĉefaj vojoj kaj fervojaj linioj, ĝi estas vera koro de la lando. Budapest portas sian nomon nur ekde la jaro 1873. Tiam oni unuigis la tri apud-danubajn urbojn: Pest, Buda kaj Óbuda (malnova Buda). La ebena Pest situas ĉe la orienta bordo de Danubo, Buda kaj Óbuda okupas la okcidentan parton kun multaj montoj.

Kontraŭe al la nuntempo, iam Buda kaj Óbuda ludis pli gravan rolon ol Pest. Tiujn partojn jam la prahomo de la neolitiko tre ŝatis pro iliaj varmaj fontoj kaj grotoj. Unue la keltoj fondis urbon en la loko de Óbuda. Ĝia nomo estis Akink (Abunda Akvo). Dum certa periodo, je

la fino de la unua jarcento la romianoj nomis ĝin Aquincum, kiu estis grava militista centro apud la danuba limo de la Romia Imperio. Post la romianoj venis aliaj popoloj, kiel ekzemple la hunoj, longobardoj kaj slavo. El la slavaj tempoj devenas la urbonomoj Buda kaj Pest. En la 9-a jarcento okazis la enveno de azidevenaj hungaroj. Unu grava tribo okupis ĝuste la iaman Aquincum. La unuaj hungaraj reĝoj havis siajn sidejojn en urboj Esztergom kaj Székesfehérvár (Esztergom, Sekeŝfehervar), sed ekde la 14-a jarcento Buda iĝis la reĝa centro.

Buda kaj Pest plurfoje devis

*Ponto super Danubo*





*Parto de Budapeŝto*

travivi malfacilan periodon. En la jaroj 1241-42 la trupoj de Ĥano Batu tute detruis ambaŭ urbojn. Post la foriro de mongoloj oni komencis konstrui la fortikajon de Buda. En la jaro 1541 la turkoj okupis Buda kaj Pest kaj restis tie 145 jarojn. Kiam en 1686 la turkoj estis elpelitaj, en Pest ekzemple restis nur kelkcento da enloĝantoj. En 1848-49 okazis la liberebatalo kontraŭ la Habsburg-dinastio. La de habsburganoj atakita hungara revolucia registaro en januaro de 1849 devis fuĝi al la orienta parto de la lando, sed en majo 1849 la liberebatalantoj per forta lukto reokupis la fortikajon de Buda. Sed bedaŭrinde tio ĉi estis preskaŭ la lasta signifita sukceso de soldatoj de La-

jos Kossuth, ĉar la liberebatalo post kelkaj monatoj falis.

Buda kaj Pest kelkfoje ĝuis ankaŭ prosperajn epokojn. Ekzemple dum la regado de Matiaso (1458-1490) Buda multe evoluis kaj iĝis unu el la centroj de la renesanca kulturo. Alia prospera periodo estis la jardekoj post 1867. En 1867 la hungaraj gvidantoj interkonsentis pri la principoj de la Aŭstra-Hungara Monarĥio kaj tiel Hungarujo ricevis relativan sendependecon. Nur la eksterlandaj, la defendaj aferoj apartenis al Vieno kaj la financado de tiuj du terenoj. Pri la aliaj aferoj decidis la hungara parlamento kaj registaro en Budapest. En la lastaj jardekoj de la 19-a jar-


cento komenciĝis grandskalaj konstrulaboroj kiujn kelkfoje akompanis iom da gigantismo, ja la hungaroj volis konkurenci kun la alia ĉefurbo, Vieno. Kune kun la rapida evoluo de la industrio ankaŭ la loĝantaro signife kreskis. Precipe en Pest estiĝis laboristaj kvartaloj.

Post la unua mondmilito Hungarujo perdis du trionojn de sia teritorio, tiam iĝis Budapest tro granda por tia malgranda lando. Dum la dua mondmilito la budapestanoj multon suferis. La urbo estis multfoje bombita kaj la sieĝo daŭris plurajn monatojn. Restis ĉie ruinoj kaj ankaŭ ĉiuj pontoj super Danubo estis eksplodigitaj. La rekonstruo postulis multajn strebojn.

*Monumento al herooj*



*La Bastiono de la Fiŝistoj en Budapeŝto*



Kiel mi jam menciis, Budapest estas industria kaj kultura centro de la lando. Lastatempe oni klopodas mildigi la troan centran rolon de la ĉefurbo. Pluraj fabrikoj estis translokitaj al la provinco, oni intence fortikigas la kulturen kaj sciencan rolon de aliaj urboj. Tiel la kresko de Budapest iom malrapidiĝis. Se temas pri la ĉefurbo, ĝenerale ĉiuj hungaroj reprezentas fortan opinion. Unu parto de ili asertas, nur en Budapest indas vivi. Aliaj diras: la homamaso — laŭ hungaraj mezuroj — la plenŝtopitaj stratoj, la bruego ne estas tolereblaj.

Rilate Esperanton apenaŭ estas diskutebla la tre grava rolo de Budapest en la hungara kaj internacia movado. Tie aktivis elstaraj figuroj de la literaturistoj de nia lingvo. Esperantlingvaj eldonadoj ankaŭ nuntempe grandkvante aperadas en la hungara ĉefurbo. Kune kun la hungaroj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj regule studas en la Esperanto-fako de Universitato Loránd Eötvös. Budapest jam dufoje gastigis la Universalan Kongreson. Unue en 1929 partoprenis 1200 personoj, due, en 1966 3975 gekongresanoj ĉeestis. Espereble la ĉijara nombro de partoprenantoj superos la ĝisnajn ciferojn.



Por komencantoj

## RAKONTO PRI PARAŜUTO

**L**UN tagon de januaro 1946 Ĝoŭ Enlaj\* flugis de Yan'an al Chongqing. Krom liaj sekvantoj, en la kajuto<sup>1</sup> estis ankaŭ Xiao Ye, dekunu-jara knabino.

La aviadilo<sup>2</sup> flugis rapide kaj trankvile. Tra nuboj oni klare vidis neĝ-kovritajn mont-pintojn onde leviĝantaj kaj malleviĝantaj. Subite frosta aer-fluo trafis la aviadilon. La flugiloj kaj helico estis kovritaj de dika glacio. Post momento glacio kovris ankaŭ la korpon de la aviadilo. La flugmaŝino ĉiam pli peza, malleviĝis pli kaj pli. Ĝi, perdinte ekvilibron, ŝanceliĝe transflugis mont-pintojn unu post alia kaj preskaŭ koliziis kontraŭ mont-pinto. En tiu kriza momento la aviadilestro ordonis malfermi la pordon kaj eljeti pakajojn eksteren por malpezigi la aviadilon. Krome li proponis, ke oni surmetu sian paraŝuton<sup>4</sup> kaj estu preta desalti.

Kiam oni estis surmetantaj ĉiu sian paraŝuton, subite aŭdiĝis ploro de la knabino. Ĝoŭ Enlaj tuj stariĝis kaj iris al ŝi grandpaŝe. Ĉar al ŝi mankis paraŝuto, ŝi ege maltrankviliĝis kaj ekploris. Informiĝinte



*Kamarado Ĝoŭ Enlaj en aerodromo de Yan'an (en decembro, 1936)*

pri tio, Ĝoŭ demetis sian paraŝuton kaj donis ĝin al la knabino. Li ameme diris: "Ho, mia infano, ne ploru, estu kuraĝa . . ."

Kortuŝite de la konduto de Ĝoŭ, ankaŭ la aliaj demetis sian paraŝuton kaj pretis ĝin doni al li. Ĝoŭ diris per kategoria tono: "Ne zorgu min, estu trankvilaj. . ."

Ĝuste tiam la aviadilo elturniĝis el la frosta aer-fluo. Sub la sunlumo la glacio sur la aviadilo degelis kaj defalis pecon post peco. La aviadilo denove leviĝis kaj plue flugis rapide kaj trankvile. "Ni eldangiĝis!" Ĉiuj ĝoje kriis en la kajuto.

### Novaj Vortoj

1. kajuto: enflugmaŝina ĉambreto por pilotoj aŭ pasaĝeroj.
2. aviadilo: flugmaŝino.
3. helico: turniĝanta pelilo de flugmaŝino.
4. paraŝuto: granda savombrelo por veturanto en flugmaŝino.

\* Ĝoŭ Enlaj (1898 — 1976) estis ĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko dum 1949 — 1976.



La Elektra Buroo de Xianning, Hubei-provinco, projektis kaj konstruis "fabrikon" de rizplantidoj. Anstataŭ uzi grundon ĝi per elektroregado kreis bonajn kondiĉojn en lumo, temperaturo, akvo, aero kaj sterko favorajn al kultivado de rizplantidoj. Per tiu metodo oni elkreskigis dikajn rizplantidojn en mallonga tempo kaj per malmulta kosto, kaj pro tio la rimedo estas tre bonvena al la vasta kamparanaro.

La "fabriko" ĉiujare liveras rizplantidojn sufiĉajn por 4 000 *mu*-oj da kampoj (15 *mu*-oj = 1 hektaro). Per tiu rimedo oni povas ŝpari po 10 kilogramojn da rizosemo por ĉiu *mu*-o, kompare kun surkampa kultivado sub plasta membrano, kaj ŝpari 400 *mu*-ojn da rizplantidaj kampoj. En la samaj kondiĉoj la de "fabriko" kultivitaj rizplantidoj ebligas pliprodukton de 10-15 kilogramoj da greno por ĉiu *mu*-o, kompare kun tiuj kultivitaj surkampe.


En la sezonoj, kiam oni ne kultivas rizplantidojn, la "fabriko" sin okupas pri aliaj laboroj: somere laborantoj sekigas tefoliojn, tritikon kaj aliajn grenojn per semtrepaj maŝinoj; vintre ili travintrigas afrikajn karasojn en sia forcejo. Krome, la "fabriko" ĉiujare produktas 50 tunojn da fungoj.

Fotoj de LI CHUNGENG



Fortikaj rizplantidoj

La "fabriko" de rizplantidoj en kamparo







Post 7-10-taga kultivado laborantoj elportas rizplantidojn por transplanti ilin surkampe.

Trempite en la medikamenta likvaĵo, rizo-semoj estas transportataj en laborejon por kultivi rizplantidojn.


Laborantoj de la laboratorio en la "fabriko" faras medikamentojn kontraŭ plantajaj malsanoj kaj fiinsektoj.





Kiam la plantidoj kreskas ĝis certa alto, oni premas iliajn pintojn por ke ili fariĝu pli fortikaj.

Laborantinoj observas rizplantidojn.



Liu Jiemin, projektinto de la "fabriko"





Kampaninoj prenas plantidojn el la "fabriko".

Transplantado de rizplandoj



## NOVA PROGRESO EN JILIN-PROVINCO

Je la fino de januaro ĉi-jare la Jilin-a Esperanto-Instituto aranĝis sian duan mallongtempan kurson por Esperantaj aktivuloj en la provinca ĉefurbo Changchun. 130 lernantoj senditaj de diversaj urboj kaj gubernioj tie lernis, kaj post sia diplomitiĝo ili eklaboris por disvastigo de Esperanto en siaj lokoj.

Inter la 24-a kaj la 27-a de januaro la Esp-grupo de la Changchun-a Geologia Instituto okazigis ekspozicion pri Esperanto en la Geologia Halo de la instituto. Estis tie eksponitaj dokumentoj kaj fotoj pri la Esp-movado tra Ĉinio, Esperantaj lernolibroj, vortaroj, jarlibroj, kaj aliaj eldonaĵoj, inkluzive de geologiaj verkoj, gazetoj kaj lernolibroj en Esperanto eksterlande eldonitaj. Dum la ekspozicio okazis kunsido, kiun ĉeestis respondeculoj de la instituto Li Xianzhong, Ma Qianle, Wang Dongpo, la direktoro de la Changchun-a Fremdlingva Lernejo Wang Xianzhang kaj aliaj. Ĉe la kunsido oni diskutis pri la decido preni Esperanton kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj en altaj lernejoj, kiun denove validigis la Ĉina Eduka Ministerio lastatempe.

## VIGLA AKTIVADO EN LIAONING-PROVINCO

En la lastaj du jaroj la Esperanta aktivado pli kaj pli vigliĝis en Liaoning-provinco. En la urbo Shenyang okazis 4 kursoj kaj fondiĝis pluraj lerno-grupoj. La Shenyang-a Agronomia Instituto, la Shenyang-a Sporta Instituto, la Politeknika Instituto de Nordorienta Ĉinio, la Shenyang-a Fabriko de Elektraĵ Maŝinoj kaj la Maŝin-fabriko de Nordorienta Ĉinio sinsekve aranĝis Esperantajn kur-

sojn. La koncernaj lernejoj kaj fabrikoj ilin subtenis kaj donis favoron al la propagando kaj instruado de Esperanto. Ekde la kuranta jaro la Maŝin-fabriko de Nordorienta Ĉinio metis la Esp-lernigon en sian edukan planon por laboristoj. Samtempe, Esperantaj grupoj kaj kursoj estas ekfunkciigitaj ankaŭ en la urboj Anshan, Dandong, Jinzhou, Yingkou, Dalian, Liaoyang, Fushun kaj Benxi de la provinco.

## VARBADO DE KORESPONDAJ LERNANTOJ EN HUAINAN KAJ HUANGSHI

La 26-an de februaro ĉi-jare la Esperanta Koresponda Lernejo de la urbo Huainan publikigis en la landinflua ĵurnalo "Guangming Ribao" (Lumo) anoncon por refoje varbi lernantojn al siaj kursoj elementa, mezgrada kaj son-lerniga. La lasta plenumas sian instruadon per sonbendoj. En pli ol unu jaro ĉirkaŭ 20 000 lernantoj diplomitiĝis el la lernejo.

Dume, lernantoj el pli ol 20 pro-


vincoj kaj municipoj jam sin anoncis por ĉeesti la Esperantan korespondan kurson aranĝitan de la Huangshi-a Esp-Asocio, post kiam ĝi komencis varbi lernantojn en la tuta lando pasint-vintre.

**Kongresa Temo de 68-a UK** La kongresa temo "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" estos eksterordinare amplekse traktata dum la 68-a UK en Budapeŝto. Okazos ankaŭ amaso da fakaj kunsidoj por trakti diversajn, specifajn aspektojn de la temo, kaj ties teknologiajn flankon oni planas elstarigi.

Scienca Eldona Centro — Budapeŝta oficejo de UEA ankaŭ planas specialajn aranĝojn por diskutado de gravaj demandoj dum tiu ĉi UK.

**El Jugoslavio** La 18-an de dec. pasintjare Esperanto Societo "Marko Neŝić" en Novi SAD organizis solenan festenon pri sia 60-jara agado. Ĉeestis ĉirkaŭ 500 personoj. La prezidanto de la solenaĵo transdonis speciale faritajn Esp. insignojn respektive al J. Veĉei kaj M. Vrtunski pro ilia fidela kaj 60-jara

*La memoriga kunveno por la dua datreveno de la fondiĝo de la Huainan-a Esperanto-Ligo kaj por la unua datreveno de la fondiĝo de la Esperanta Koresponda Lernejo de Huainan*



membreco kaj aktiveco en la societo. Siavice la du meritplenaj maljunuloj donacis al la societo bele kadrigitan silk-portreton de D-ro L. L. Zamenhof faritan en Ĉinio.

**El Rumanio** Inter la 7-a kaj 15-a de la pasinta decembro estis aranĝita ekspozicio de E-libroj kaj revuoj en la halo de la Municipa Biblioteko en Bukareŝto. La ekspozicion aŭspiciis la Municipa Biblioteko kaj la Kulturdomo de la Tria Sektoro de Bukareŝto. Ĝin vizitis grandnombra publiko.

**El Turkio** Okaze de 100-jara jubileo de Esperanto, Turka Esperanta Asocio decidis aktivigisian agadon koncerne disvastigon de Esperanto en Turkio kaj en aliaj landoj de la Oriento. Kunlaborante kun la turka MATUR TURIZM oficejo TEA okazigos en 1983: 1) 50 unusemajnajn restadojn en Istanbulo kaj Bursa; 2) Internacian Kuirartan Konkurson en Istanbulo, en junio; 3) Tagojn de Kanto-Humuro-Danco en Istanbulo, en aŭgusto; 4) 9 unumonatajn ekskursojn Turkio-Irano-



*S-ino Kikusima Kazuko (la unua de dekstre) diskutas kun aktivuloj de Kalkuto, Hindio. Prof. Sinha Ray (la dua de dekstre) estas lingvistika profesoro en la Kalkuta Universitato.*

Pakistano-Hindio kaj reen; 5) 25 semajnajn Esperanto-feriadojn en Turkio kaj en Cipro. Ĉiuj vojaĝemaj samideanoj aŭ Esp. redakcioj kunlaborantaj per varbado ĝuos senpagan aranĝon favore al si mem. Inf.: MATUR TURIZM Esp-

lingvaj servoj, Inönü cad. n-ro 15/1, BURSA — TURKIO.

**El Japanio** S-ino KIKUSIMA Kazuko (=Krizantemo), membro de la komisiono pri Landa kaj Regiona Agado de UEA kaj du aliaj



*La aŭtoritatuloj de Caltagirune vizitas la ekspozicion.*

japanaj junulinoj vizitis hindajn esp-istojn de la 29-a de dec. 1982 ĝis la 7-a de jan. 1983. Ili kunportis multe da libroj donacitaj de japanaj Esp-organizaĵoj (JEL, KLEG kaj NEC) kaj de la vojaĝantoj mem (sume ĉ. 100,000 enoj vendopreze) kaj ankaŭ por-Esp-an tajpilon. En diversaj okazoj Kri-zantemo parolis kaj diskutis pri movadaj aferoj kaj flegis amikecon kun lokaj esp-istoj.

**El FR Germanio** La 16-an de dec. 1982 Esperanto-Grupo Villingen-Schwenningen, festis la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. La grupestro Josef Schiffer prelegis pri la vivo de la kreinto de Esperanto kaj donis al la membroj ampleksan jarraporton. Ekde la fondiĝo de la grupo la 6-an de nov. 1980 jam 142 personoj komencis tie lerni Esperanton. La loka gazetaro aperigis la inviton al la Zamenhof-festo kaj poste raportis pri ĝi.

**El Svislando** Kultura Centro Esperantista aranĝos Esperanto-staĝojn por komencantoj kaj progresantoj. Se vi komencis lerni la lingvon, sed ankoraŭ ne kapablas paroli ĝin, aŭ vi deziras lertiĝi en la praktikado de la internacia lingvo, Esperanto-staĝo certe multe helpos vin. La staĝojn gvidas Stefano Keller, Esperanto-instruisto kaj psikopedagogo.

Aliĝilojn petu de Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

**El Italio** La 21-28-an de nov. 1982 okazis en Caltagirune la Unua Internacia Ekspozicio de Turismaj Afiŝoj kaj Broŝuroj — Urboj en la Mondo. La urbestro kaj la tuta urba konsilantaro konsentis protekti kaj subvencii la ekspozicion. Ĝin vizitis studentoj, oficistoj, instruistoj, urbaj policistoj, laboristoj ktp. Inter ili krom la urbestro kaj la skabeno pri kulturaj bonoj, estis ankaŭ la itala parlamentano Danilo Morini el Bologna.

## ESPERANTO KAJ INTERNACIA EKSPOZICIO

### — RAPORTO EL IRANO



*F-ino Sirin Ahmad-Nia*

**F**-INO Sirin Ahmad-Nia raportis el Teherano, ke pasintjare okazis en la ĉefurbo de Irano la Oka Internacia Industria Ekspozicio kun 22 partoprenantaj landoj, kiu daŭris 12 tagojn. Membroj de la Irana Esperanto-Laborgrupo por Disvastigi Esperanton sub la gvido de prof. M. H. Saheb-Zamani laŭplane vizitadis la ekspozicion unu-aŭ kelk-ope, petis de ĝiaj laborantoj broŝurojn en Esperanto, demandis ilin pri ilia eventuala kono de Esperanto kaj iliaj opinioj pri ĝi kaj ankaŭ vigle informis interesitojn pri la disvastigo de Esperanto en Irano kaj aliaj partoj de la mondo inkluzive de iliaj propraj landoj.

Tiu aktivado estis aranĝita laŭ decido farita en kunveno speciale okazigita antaŭ la komenco de la ekspozicio, kaj la esperantistoj estis bone ekipitaj per diversaj informoj kaj materialoj kaj ili pretigis diversajn demandojn. Ili sukcesis interesi multajn el la laborantoj kaj ankaŭ renkontis kelkajn iamajn espe-

rantistojn el Hungario kaj Aŭstrio, kiuj entuziasme rakontis pri sia lernado de Esperanto kaj volis reveni al la movado pro la instigo.

Post la ekspozicio, la grupanoj kunvenis por resumi siajn spertojn kaj ili konstatis:

1) Esperanto devas esti disvastigata en la sfero de industrio kaj komerco.

2) Ankaŭ en aliaj landoj oni povas fari same kiel la iranaj esperantistoj dum la Oka Internacia Industria Ekspozicio.

3) Se diverslandaj esperantistoj simile agadus dum la ĉ. 100 internaciaj ekspozicioj en ĉiu jaro, neniu komerc-industria entrepreno ne konus Esperanton kaj ignorus pri ĝi post 3-5 jaroj.

4) Simila agado povus esti farata ankaŭ ĉe alispecaj internaciaj kunvenoj de sportistoj, artistoj, filmistoj, Unesko ktp.

(Laŭ "IRAN-ESPERANTO RAPORTAS")

SONG SHENGTAN:

## MI KAJ ESPERANTO- FILATELO

“Nun mi jam povas ekspozicii ĉinajn filatelajojn ricevitajn de vi, ĉar ĉi tie oni malofte povas vidi tiaspecan kolekton. Unuataga koverto kaj poŝtaj tutajoj el via lando vekas ĉies apartan intereson, ĉar temas pri objektoj ellaboritaj kun altnivela arta gusto. Laŭ la teknika vidpunkto la presajoj estas majstraj.

Jes, dank' al Esperanto ni farigis amikoj. La granda ideo de unu helpa lingvo de dua lingvo por ĉiu homo sur la tro suferinta Tero, faris ĝin instrumento por finfine INTERKOMPRENIGI KAJ INTERAMIKIGI.”

Jen vortoj el la letero sendita de mia jugoslava amiko Ivan Andrejevic. S-ro Andrejevic estas 69-jara, je 20 jaroj pli aĝa ol mi. Malgraŭ longa distanco inter Ĉinio kaj Jugoslavio kaj malsamaj naciecoj, ni amikas de multaj jaroj pere de korespondado. Jen la komuna lingvo — Esperanto kaj nia komuna intereso — filatelo, cementas nian amikecon.

De infanaĝo mi ŝatas kolekti poŝtmarkojn. Iam mi kolektis speciale poŝtmarkojn de Britio kaj ĝiaj kolonioj kaj havis sufiĉe grandan kolekton. Poste mi vizitis la Nankinan Universitaton. Foje mi hazarde legis en iu gazeto artikolon pri Esperanto, kiu forte interesis min. Fine de 1958 mi komencis lerni la internacian lingvon. Post nelonge mi interesiĝis pri Esperanto-poŝtmarkoj. Mi ĉiamaniere faris kolekton. Kaj en 1966 mi jam havis plejparton de Esperanto-poŝtmarkoj emisiitaj de diversaj landoj, inkluzive de la verda poŝtmarko en valoro de kvin pfenigoj kun la Princo regento Luitpold kun afiŝa kuponeto de “Esperanto-vegetara restoracio”, eldonita de Bayern en 1911. Sed baldaŭ venis katastrofo. La tiel nomata “Kultura

Revolucio” perdigis al mi la Esperanto-legaĵojn kaj la karajn Esperanto-filatelaĵojn. Kaj mi tute ĉesis lerni Esperanton kaj kolekti poŝtmarkojn.

En 1977, letere kuraĝigate de la veterana esperantisto s-ro Tikos, mi denove komencis lerni Esperanton kaj kolekti Esperanto-filatelaĵojn. Kompreneble ĉi foje mi spertis pli da malfaciloj dum la kolektado, ĉar antaŭlonge rompiĝis mia rilato kun fremdlandaj amikoj, mi ne povis interŝanĝi poŝtmarkojn kun ili, kaj krome mankis al mi informoj pri tiu aktivado. Mi do min turnis al s-ro Ivar Paulsson por peti helpon. S-ro Paulsson estas prezidanto de Esperanto-Ligo Filatelista — Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj. Li tuj respondis al mi kaj sendis al mi du valoregajn librojn eldonitajn de la Ligo. Helpe de li, mi retrovis mian malnovan amikon en Svedio s-ro Kurt Lindström, kun kiu mi perdis rilaton antaŭ 15 jaroj. Nun li ofte sendas al mi Esperantaĵojn. Sekve mi farigis membro de tiu ĉi Ligo kaj ekrilatis kun kelkaj Esperanto-filatelistoj en diversaj landoj. Mi prezentis al ili ĉinajn filatelaĵojn kaj samtempe havigis al mi diversajn valorajn Esperanto-poŝtmarkojn.

Nun mi kolektas nur Esperanto-filatelaĵojn. Kvankam la nuna kolekto estas ne tiel granda kiel la antaŭa, tamen ne mankas raraĵoj. Inter ili estas memoriga poŝtmarko de la 38-a Universala Kongreso, emisiita de Jugoslavio en 1953, donacita de mia malnova amiko s-ro Andrejevic, memoriga poŝtmarko de la 30-a jubileo de la Bulgara Esperanto-Kongreso, emisiita en 1947, donacita de nederlanda esperantistino Goossens, memoriga poŝtmarko de la 10-a Universala



*Song Shengtán ordigas Esperanto-filatelaĵojn.*



## La dua juneco

—PRI PENTRISTO DONG CHENSHENG



Dong Chensheng

ANTAŬ ol mi vidis pentriston Dong Chensheng, mi jam bone konis liajn verkojn. Li estas lerta en pentrado de ilustraĵoj, bildserioj kaj propagandaj pentraĵoj. La homfiguroj pentritaj de li estas ĝustaj en formo, vivecaj kaj impresantaj per natureco kaj amindeco. Li neniam vizitis belartan lernejon. Li ŝuldis sian sukceson al sia diligentecon en memlernado. Poste

li laboris kiel mia kolego dum multe da jaroj kaj mi propr-okule vidis lian diligentecon. Iam li faris skizon seninterrompe dum pluraj horoj en neĝvento. Liaj manoj ŝveliĝis de frosto, sed tion li tute ne sentis.

Ĉu li estas kontenta pri sia rimarkinda sukceso? Ne. Foje li diris al mi sian ĉagrenon, kiu videbligis lian rigoran postulon

al li mem. Por vera artisto, tiu ĉagreno en kreado estas natura kaj valora, ĉar ĝin ofte sekvas inspiro.

En 1975 Dong komencis fari, en postlaboraj horoj, tradiciajn ĉinstilajn tuĉpentraĵojn, ĉefe pri homfiguroj en pekinaj operoj kaj dancoj. En sia knabeco li lernis pentri surscenejajn homfigurojn, sed nur rudimenton de la arto. Nun li devas lerni de-

\*\*\*\*\*

Kongreso en Brazilo emisiita en 1945, donacita de franca s-ano Amoureux. Tiuj poŝtmarkoj el aliaj landoj simbolas amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj kaj inspiras min pli diligente lerni Esperanton kaj uzi ĝin en praktiko. Mi kolektis ankaŭ multajn Esperanto-glumarkojn. Mi forte deziras, ke post nelonge mi sukcesos kolekti la glumarkojn uzitajn en ĉiuj universalaj kongresoj. Tiam mi povos aranĝi ekspozicion kun tiu faka temo en mia hejmurbo Nankino.

Mia Esperanto-poŝtmarka albumo registras mian lernadon de Esperanto. Dum kolektado de poŝtmarkoj, mi ne nur lernas

la lingvon, sed ankaŭ akiras multe da konoj pri Esperanto. Mi vidis la brilan perspektivon de la lingvo. De multaj jaroj, helpe de Esperanto, mi riĉigas miajn sciojn, larĝigas mian vidkampon kaj pli bone konas la mondon. Kaj helpe de Esperanto mi amikiĝis kun diverslandaj esperantistoj. El mia sperto mi bone komprenis, ke Esperanto estas ponto de paco kaj bona ilo por interkomprenigi kaj amikigi ĉiujn popolojn de la mondo. Ĝi proksimigas min al la mondo, kaj helpas miajn amikojn, diverslandajn korespondantojn pli bone koni mian patrolandon — Ĉinion.

1982 estis la 95-jara jubileo de Esperanto. Okaze de tio mi verkis artikolon sub la titolo “Zamenhof kaj Esperanto” kaj aperigis ĝin en la ĉina fama gazeto “Filatelo”, kies eldona kvanto superas 250 mil ekzemplerojn. Mi tre ĝojas, ke mi profitante la okazon, povas prezenti Esperanton al filatelaj amatoroj kaj Esperanto-filatelon al esperantistoj.

En la pasintaj 95 jaroj senĉese disvolviĝis la Esperanto-movado. Tio montris, ke Esperanto estas viva lingvo konata de ĉiam pli multaj homoj. Mi deziras al ĝi pli grandan disvastiĝon en la mondo.

nove kun malfacilego. “Antaŭe mi opiniis min iom lerta en pentrado, sed nun, mi subite trovis, ke mi konas nenion en la arto,” foje li diris al mi. Dong penege klopodas por venki tiun maltrankvilon. Ne timante eventualan malsukceson, li iras antaŭen kun nenia hezito, decideme forlasinte la por li bone konatan malnovan vojon.

Por fari tradician ĉinstilan tuĉpentraĵon, antaŭ ĉio oni devas bone konsideri pri la koncepto. Dum ekzercado li ne sole atentis pri esprimmanieroj, sed ĉiam verŝis sur papero sian grandan entuziasmon kaj plenan emocion.

En la lastaj jaroj Dong Chensheng kreis grandan nombron da ĉinstilaj pentraĵoj pri homfiguroj. Pasintjare en Pekino okazis “Ekspozicio de Figuraj Pentraĵoj de Dong Chensheng”, kie ekspozicio,


diris, ke estas tre malfacile kapti la stilojn proprajn al iuj nacimalplimultaj dancoj, tamen la dancantaj homfiguroj de Dong estas gustoplenaj.

niĝis liaj 130 pentraĵoj. Inter la verkoj tiuj pri homfiguroj el pekinaj operoj estis pli allogaj. La pekinaj operoj “Xiang Yu Adiaŭas Sian Edzinon”, “Ebriĝo de Imperiestra Kromedzino Yang”, “La Simio Sun Wukong” estas temoj plej ŝatataj de li en la pentrado. Li lertas en resumado de ĉefa enhavo de teatraĵo kaj elstarigo de aspektoj kaj mienoj de roloj. Mi tre miris, ke li povas tiom ekzakte kapti la movojn kaj mienojn de aktoroj, kvazaŭ li subite haltigus moviĝantajn figurojn sur papero en palpebruma daŭro. Liaj homfiguraj pentraĵoj konservas la originan fizionomion de sceneja arto. Li emfazas forman belecon de figuroj kaj havigas al siaj verkoj helan koloron de folkloraj pentraĵoj. Ankaŭ liaj dancantaj homfiguroj ĝuigas belecon. Iu dancisto, kiu vizitis la ekspozicio,

Nelonge post la vizito de la ekspozicio mi renkontiĝis kun Dong. Mi gratulis lin, sed li diris, ke liaj pentraĵoj estas ankoraŭ en provado, malaperis la malnova ĉagreno, sed venis ĉagreno nova.



*Zhong Kui (pentrita laŭ popola mito)*



*Fianĉiĝo per forta pafarko (pentrita laŭ pekina opero)*



# SHIZHONG-MONTO

de ZHENG XINYU

**E**N la norda parto de Jiangxi-provinco, ĉe la enirejo de Jangzi-rivero al Poyang-lago simetrie staras du montetoj “Supra Shizhong” en sudo kaj “Malsupra Shizhong” en nordo.

Estas diversaj diroj pri la deveno de la montnomo. Ĉar “Shizhong” en la ĉina lingvo signifas “ŝtona sonorilo”, tial iuj diris, ke la montoj ricevis la nomon pro sia sono, dum aliaj diris, ke ili ricevis la nomon pro sia formo. Ambaŭ montoj baziĝas sur la riverfundo. Ili aspektas majeste ekstere, sed interne estas malplenaj kun maldikaj rokmuroj kaj multaj kavernoj. Kiam la akvo frapas la kavernajn rokmurojn, eliĝas ritmaj plaŭdsonoj. La montoj, mallarĝaj ĉe la supro kaj larĝaj ĉe la bazo, tre similas al gigantaj sonoriloj, pro kio niaj antikvuloj donis al ili tian nomon. Ili estis menciitaj en verko pri riveroĵo antaŭ pli ol 1 700 jaroj, la unua libro tiuflanka de Ĉinio.

Kompare kun la Supra Shizhong-monto, la Malsupra estas pli mirinda. Ĝi estas ĉiam verde vestita, kun tre ĉarmaj pejzaĝoj. En iu luna nokto Su Dongpo, fama literaturisto en la 11-a jc., interesplene venis ĉi tien per boato kun sia filo kaj eniris en akvajn kavernojn por fari esplorado. Post tio li verkis la faman prozon “Pri Shizhong-monto”, kaj de tiam oni nomis

la Malsupran Shizhong-monton simple Shizhong-monto.

Tie troviĝas du vojoj, kiujn turistoj povas preni pro ĝui la pejzaĝon. La orienta vojo, konstruita antaŭ kelkaj jaroj, estas larĝa kun ŝtonaj ŝtupoj kaj la suda, ekzistanta delonge, estas vojstreko por grimpi supren. La montogrimpado ebligas ĝui pejzaĝojn ĉirkaŭe. Oni sentas gran-

dan plezuron, karesate de milda vento.

La monto ne havas grandan areon, tamen tie kuŝas multe da kortoj kaj kioskoj. Ĉe la montotalio, sur la suda vojo, estas la kiosko Banshan, kiu unue frapas la okulojn de turistoj. Malantaŭ la kiosko staras du konstruaĵoj: unu estas la kiosko Huaisu, konstruita por rememorigi pri la



Ziyunlang sur Shizhong-monto

Su Dongpo, la alia estas la eleganta ĝardeno Ganyuan. En la ĝardeno estas zigzaga koridoro, maldekstre de kiu kuŝas delikata antikva korto kun ronda pordo kaj eleganta dometo, tre simila al antikva ŝipo por ŝtatifacistoj, pro kio oni nomas ĝin ankaŭ "Ŝip-halo". Antaŭ ĝi abrupte staras krutajo rigardanta al la rivero. Se oni rigardas malproksimen, oni povas vidi la brile ondetantan riveron. Pli supre de la ĝardeno estas la fama Umea Halo.

Oni diras, ke ĉirkaŭ la halo iam kreskis 60 umearboj. Sed ili malaperis kun tempopaso. Hodiaŭ tie orfe staras stranga arbo, kun melia bazo. Ĝia trunko konsistas duone el firmiano (*Firmiana Simplex*) kaj duone el olea kamelio. Somere la verda triunuo bone kreskas, ke oni malfacile distingas ĝian konsiston. Aŭtune flaviĝas la melio, verdiĝas la firmiano kaj ruĝiĝas

la olea kamelio, kvazaŭ du infanoj brakumataj de sia patrino senmove starus tie, kio vekas grandan admiron de la turistoj.

Oriente de la Umea Halo estas la kiosko "Reveno", kiu konstruiĝis por rememorigi pri Tao Yuanming, fama poeto de Jindinastio en la 5-a jarcento. Tao iam estis estro de la gubernio Pengze, proksime de Shizhong-monto. Pro malkontento pri la malluma regado de la egbienuoj, li forlasis sian postenon kaj ermitiĝis. Ne malproksime de la kiosko staras du-etaĝa domo kun tegmento el verdaj tegoloj kaj oranĝkoloraj randoj. La domo ebligas birdvidon al la tuta gubernia urbo Hukou.


Shizhong-monto estis loko ŝatata de antikvaj literaturistoj. Sur la monto ĉie troveblas iliaj postsignoj. Ekz., sur la rokmuro kontraŭ la ĝardeno Ganyuan estas la ĉizita prozo "Pri Shizhong-monto" de Su Dongpo,

en la Umea Halo ĉe la montsupro staras steleo kun poemo pri ume-floro, kaj ĉirkaŭ la kaverno Persikaj Floroj, dekstre de la monto, legeblas ĉizitaj ideografiaj kaj poemoj preskaŭ sur ĉiu roko.

La pejzaĝo ĉe la piedo de la monto estas ankoraŭ pli alloga. Se oni remas en boato ĉe la montpiedo, oni povas vidi la krutajon kvazaŭ falonta. La rokoj estas purigitaj de plaŭdantaj ondoj. En la inunda sezono estas superakvitaj la kavernoj, kiujn oni povas revidi nur en la seka sezono, post retiriĝo de la superakvo. La kavernoj interligiĝas de zigzaga trairejo. Perboata ekskurso havigas al la turistoj la senton de Su Dongpo remanta siatempe sub la hela luno.

Nun la pitoreska Shizhong-monto estas multe vizitata loko, kiu akceptas turistojn el diversaj partoj de la mondo.

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Fengyang-gubernio
2. Changzhou
3. Taihu-lago
4. Wuxi
5. Shizhong-monto
6. Luoyang
7. Xuchang
8. Jiangsu-provinco
9. Zhejiang-provinco
10. Yunnan-provinco
11. Guizhou-provinco
12. Chongqing
13. Yan'an

# *Shizhong-monto*

(Bv. legi la artikolon "Shizhong-monto" en ĉi tiu numero.)

Fotoj de CAI HAIFENG kaj

YANG GEISHOU






Velboatoj sur Poyang-lago



Kolora skulptaĵo farita laŭ popola legendo




Antikva pagodo

# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de HARTMUT WERDERMAM (FR Germanio)

Hejmeca korto sur la insulo Kreta



## ŜTONKAPA FIŜO KUN PINAJ NUKSOJ





(Daŭrigo de p. 5)

Kontraŭ la supre diritaj simptomoj la ĉin-medicinaj kuracistoj aplikas malsamajn kurac-metodojn. Ili uzas subpreman metodon kontraŭ la pozitiva simptomo, ekscitan kontraŭ la negativa, ŝvitigan kontraŭ la aspekta, laksigan kontraŭ la interna, varmoreduktan kontraŭ la varma, varmoaldonan kontraŭ la malvarma, laksigan kontraŭ la hiperfunkcia kaj tonikodonan kontraŭ la hipofunkcia.

Ofte okazas, ke iu simptomo kunezistas kun alia ĉe sama malsanulo, ekz., estas aspekta malvarmo kaj samtempe interna varmo. Tial, oni ĝenerale aplikas sintezan rimedon kontraŭ la malsano.

Krom fari distingon laŭ la ok ĉefaj sindromoj, oni devas ankaŭ konsideri la lokon de malsanoj kaj ilian kaŭzon. Malsanoj povas okazi ĉe 12 internaj organoj: koro, pulmoj, hepato, lieno, renoj, perikardio, stomako, galveziko, dika intesto, maldika intesto, veziko kaj tri visceroj. Malsanojn kaŭzas vento, varmo, malvarmo, sekeco, malsekeco, fajro kaj ankaŭ troĝojo, kolero, melankolio, meditemo, afliktiĝo, timo kaj surpriziĝo. Tial por fari diagnozon oni devas koni la karakteron de simptomoj, la lokon de patologia ŝanĝiĝo kaj la kaŭzon de malsano. En reguligado de rezistpovo kaj reakcio kontraŭ malsano, oni devas uzi taŭgajn medikamentojn

konsiderante la lokon de patologia ŝanĝiĝo kaj la kaŭzon de malsano. Nur tiel oni povas rikolti kurac-efikon.

La tradicia ĉina medicino faras ĉefe analizon kaj distingadon de simptomoj. Ĝi apartenas al la kategorio de scienco pri malsaniĝo. Oni observas la malsanon en ĝia movado, prenas la malsanulon kiel kurac-objekton, akcentas la rolon de la interna faktoro kaj montras la komunan karakteron de malsanoj. Sed la moderna okcidenta medicino faras ĉefe distingadon de malsanoj. Ĝi apartenas al la kategorio de patogeno scienco, prenas la malsanon kiel kurac-objekton, akcentas la rolon de la ekstera faktoro kaj montras la individuecon de malsanoj. Ĝuste en tio kuŝas la plej ĉefa diferenco inter la tradicia ĉina medicino kaj la moderna okcidenta medicino.

Dank' al la disvolviĝo de la moderna okcidenta medicino dum la proksimaj jaroj, la esplorado en tiu medicino transiras de la kaŭzo de malsano al ĝia estiĝo, de la malsano al la malsanulo kaj de la ekstera faktoro al la interna. Tial ĉiam pli malgrandiĝas la diferenco inter la ĉina kaj okcidenta medicinoj. Oni povas antaŭvidi, ke kun la progreso de la epoko kaj la disvolviĝo de sciencoj tiuj du medicinoj certe kuniĝos kaj interkompletigos unu la alian, kaj fine ili fariĝos unueca monda medicino por pli bone servi al la homaro.

## ŜTONKAPA FIŜO KUN PINAJ NUKSOJ

Materialoj:	salto	10 g.	3. Preparu dolĉ-acidan saŭcon:	
ŝtonkapa fiŝo	1 (1 000 g.)	trapaŭ alispeca amelo	50 g.	Fritu pinajn nuksojn en la oleo ĝis flaviĝo. Metu ilin en bovlon, aldonante la supon, sukeron, vinagron, tomatan saŭcon, salon kaj trapan amelon. Kirli ilin ĝis densiĝo.
arakida oleo	500 g. (50. por konsumo)	supo sen viando	50 g.	
vintraj bambuŝoj (tranĉitaj en formon de ĵetkuboj)	25 g.	Preparado:		
sekaj fungoj (trempitaj en akvo kaj tranĉitaj en formon de ĵetkuboj)	25 g.	1. Forigu la skvamojn, internajojn kaj dorsan oston de la fiŝo. Lavu ĝin kaj tranĉetu ĝian supron en formon de pinaj konusoj. Spicu ĝin per rizvino kaj salo. Post kiam ĝi havos guston, maldike kovru ĝin per seka trapa amelo.		
verdaj faboj	25 g.			4. Varmigu la oleon en pato kaj longe fritu la fiŝon ĝis helbruniĝo. Elprenu ĝin kaj metu ĝin en pladon. Forigu la oleon. Metu la bambuŝojn, fungojn kaj ŝinkon, verdajn fabojn kaj dolĉ-acidan saŭcon en la antaŭan varman paton. Kuiru ilin ĝis densiĝo. Versu ilin sur la fiŝon, tiam la plado estas preta.
ŝinko (tranĉita en formon de ĵetkuboj)	15 g.			
pinaj nuksoj (kerno)	15 g.	2. Fritu en pato la vintrajn bambuŝojn, fungojn kaj ŝinkon tranĉitajn kaj la verdajn fabojn ĝis kiam ili fariĝos manĝeblaj.		
sukero	150 g.			
vinagro	30 g.			
tomata saŭco	25 g.			

# SUR LA VOJO DE RIĈÎĜO

## —NOTOJ PRI LA AGRIKULTURA PRODUKTA RESPONDECSISTEMO DE FENGYANG-GUBERNIO

**E**N Anhui-provinco en la malsupra baseno de Jangzivero troviĝas Fengyang-gubernio fame konata pro malriĉeco en la historio. Ĝi ofte suferis naturajn katastrofojn. En la lastaj jaroj ĝi elturnis sin el malriĉeco, tiu granda ŝanĝo multe interesis min, kaj mi decidis veturi al ĝi por rigardi.

Iun tagon de novembro lastjare, kiam mia aŭto eniris Fengyang, mi vidis tra la fenestro vastan ebenaĵon, sur kiu jam finiĝis aŭtuna rikolto kaj kampoj de tritikaj kaj kolzaj plantidoj sterniĝis kvazaŭ verdaj tapiŝoj, el verdaj elrigardis ĉie ruĝaj aŭ grizaj novaj domoj de kamparanoj. Kiam mia aŭto trapasis movoplenan foiron, min altiris abunde vendataj lokaj

produktaĵoj: greno, legomoj, kokoj, fiŝoj, viandoj, ovoj kaj aliaj.

### VORTOJ DE SEKRETARIO DE LA GUBERNIA PARTIA KOMITATO

En la vespero, kiam mi atingis la guberniurbon de Fengyang, mi vizitis la sekretarion de la Gubernia Partia Komitato Chen Tingyuan. Li rakontis al mi la vojon iritan de la kamparanoj de tiu gubernio en la pasintaj pli ol 30 jaroj. Li rememoris pri la pasinta mizero kaj ankaŭ esprimis sian ĝojon pri la nuna feliĉo.

Li diris, ke de 1949 ĝis la meza periodo de la kvindekaj jaroj, post la agrara reformo la ĉinaj kamparanoj iris sur la so-

cialisman vojon, kio multe levis ilian produktan aktivecon, akcelis la agrikulturan produktadon de Fengyang kaj plibonigis ĝian popolan vivon. Sed poste iuj eraraj politikoj pri la agrikulturo vundis la aktivecon de la kamparanoj, malhelpis la agrikulturan produktadon kaj portis al la kamparanoj grandajn malfacilojn en la vivo. Dum 23 jaroj de 1956 ĝis 1978, anstataŭ vendi grenon al la ŝtato la kamparanoj de Fengyang forkonsumis 200 000 tunojn da greno liveritajn de la ŝtato. Samtempe la ŝtato prunte donis kaj senpage investis al ili 120 000 000 juanojn. Laŭ la statistiko en la fino de 1978, la komunumoj kaj produktaj taĉmentoj de Fengyang havis fiksan kapitalon de 18 700 000 juanoj, sed la produktaj taĉmentoj ŝuldis al la ŝtato 18 800 000 juanojn. Plejparto de la kamparanoj tiam vivis en manko de greno kaj vestoj.

Printempe de 1979, la gubernio komencis praktiki agrikulturan produktan respondecsistemon. Post tiujara aŭtuna rikolto, ĉiuj kamparanaj familioj de la gubernio havis superfluan grenon por vendi ĝin al la ŝtato. De 1979 ĝis 1981, ili vendis al la ŝtato 200 000 tunojn da greno. En 1982 la totala produkto-kvanto de greno de la gubernio atingis 357 500 tunojn. La pokapa agrikultura enspezo (ne inkluzivanta la aliajn enspe-

*Kamparanoj de Fengyang vendas superfluan grenon.*



zojn) kreskis de 61 juanoj en 1978 ĝis 350 juanoj.

Chen Tingyuan fiere diris: En la lastaj jaroj la ŝlosilo de nia sukceso en agrikulturo estis, ke ni praktikis produktan respondec-sistemon konforman al la postulo de la vasta kamparanaro.

## RIĈIGA VOJO POR HODIAŬ

En la sekvanta tago mi veturis al la produkta taĉmento Xiaogang de la komunumo Liyuan.

Ĝi, kiel aliaj produktaj taĉmentoj en la provinco, praktikis la politikon fiksi produktan kvoton al ĉiu familio frue en la kvindekaj jaroj, precipe en la komenca periodo de la sesdekaj jaroj. Laŭ la politiko la produkta taĉmento donis siajn kampojn al ĉiu kamparana familio por terkulturado, post rikoltado la kamparano donis la kontrakte fiksitajn produktajn kvotojn al la produkta taĉmento kaj mem rajtis disponigi la superproduktan kvanton. Ĉar ĝi enkorpiĝis en si la principon: kiu laboras multe, tiu enspezas abunde, ĝi estis bonvena al la kamparanoj. Sed poste, kulpigate, ke ĝi malobservas la socialisman principon, ĝi estis ne plu praktikata.

En 1979 okazis en la regiono sekegeco malofte vidata en la historio. Komence, la taĉmento disdonis al kamparanoj parton de siaj kampoj por ke ili mem kulturu, opiniante, ke tio estas pli bona ol senrikolta kolektiva terkulturado. La faro de la taĉmento estis ja longtempe dezirata de la kamparanoj, ĉar ĝi strikte ligiĝas kun iliaj propraj interesoj. Malgraŭ la malbonaj klimataj kondiĉoj, ili ĉiamaniere batalis kontraŭ la natura plago. Rezulte de tio, la totala produk-

*Geng Demei (la meza) kun sia edzo kaj filino*



tokvanto de greno tiujare kreskis de 19 000 kilogramoj en 1978 ĝis 94 000 kilogramoj, tiu de la oleaj plantoj superis la totalan produktokvanton de tiuj en pli ol 20 jaroj post 1956.

Pri la sukceso de la taĉmento Xiaogang baldaŭ informiĝis la tuta gubernio. Oni komencis imiti ĝian faron. En 1980, pli ol 90% de la produktaj taĉmentoj de la gubernio praktikis la produktan respondec-sistemon fiksi la produktajn kvotojn de kampoj al kamparanaj familioj.

Kiam mi interparolis kun kamparanoj de tiu taĉmento, multaj laŭdis la sistemon, ke ĝi havigis al ili riĉigan vojon.

Kio do estas la sistemo efektive? Dum la intervjuo mi prezentis tiun demandon al Yan Junchang, taĉmentestro de Xiaogang.

La klereco de Yan Junchang estas ne tre alta, sed li tre lertas en terkulturado. Li kondutas modeste, juste kaj funkciis kiel taĉmentestro jam multajn jarojn. Post iometa meditado li ekparolis:

La sistemo difinas: la taĉmento fiksis la kampojn kaj iliajn produktajn kvotojn al kamparanoj per kontrakto. La posedan-

teco de la kampoj apartenas al la kolektivo kaj la kamparanoj rajtas terkulturi kaj rikolti. Post dekalkulo de parto el la rikoltaĵoj, kiu estas uzata por pagi agrikulturan imposton kaj doni al la kolektivo laŭ la kontrakto, la restanta parto apartenas al la terkulturanto. La parto donita al la kolektivo estas uzata por la komunaj interesoj de la taĉmento, ekz., konstrui komunan instalaĵon, entrepreni kulturan kaj edukatan aferon, vivteni orfojn, gevidvojn, mal-sanulojn kaj kriplulojn kaj subvencii taĉmentajn kadrojn pro ilia oficlaboro.

## TIO NE ESTAS SOLA EKZEMPLO

Post praktiko de la sistemo, la kamparanoj tenis sian sorton en siaj propraj manoj. Ĉar la parto de la rikoltaĵoj por doni al la ŝtato kaj la kolektivo estas malgranda kaj fiksa, kiu laboras multe, tiu enspezas abunde, kio multe akcelas la agrikulturan produktadon. La disvolviĝo de la produktado alportis al ilia vivo grandan ŝanĝiĝon. En tio servas kiel bona ekzemplo la familio de kamparano Geng Demei en la komunumo Yinjian.

La edzo de Geng Demei estas laboristo en la Ŝtala Fabriko de Bengbu en Anhui-provinco. Ŝi vivas kune kun siaj tri infanoj kaj pli-ol-60-jara bopatro paralizita. Antaŭe pro manko de vira laborforto kaj la pezaj domlaboroj, ŝi ofte ne povis partopreni en kamplaboroj, ŝi preskaŭ ĉiujare ŝuldis al la taĉmento 200-300 juanojn.

Post praktiko de la sistemo, same kiel aliaj kamparanoj, Geng Demei ricevis 11 muojn (unu muo=1/15 hektaro) da kampoj. Ĉu ŝi povas plenumi tiel multe da kamplaboroj? Ŝi diris al mi, ke por tio ĉiutage ŝi ellitiĝis antaŭ la sunleviĝo. Dum transplantado de rizplantiĝoj kaj rikoltado, ŝi dungis aliajn kamparanojn por helpo aŭ interŝanĝis laborojn kun parencoj kaj najbaroj. Ankaŭ ŝia edzo ŝin helpis en kamplaboroj dum ferioj. Tiamaniere, ŝi rikoltis 6 000 kilogramojn da greno en 1981 kaj pli ol 7 000 kilogramojn da greno en 1982. Tiujare ŝi enspezis pli ol 2 700 juanojn post dekalkulo de la elspezoj por sterko, insekticido, semoj kaj tagdungitoj, kaj la monsumo donenda al la kolektivo. Per tiu monsumo Geng Demei aĉetis mantraktoron, lavmaŝinon, televidilon, kudromaŝinon, diktafo-

non, elektran ventumilon kaj radioricevilon.

Oni diris al mi, ke tiaj kamparanaj familioj en Fengyang kia Geng Demei estas nemalmultaj.

## VIGLA DOMKONSTRUADO

En la pasintaj kvar jaroj, kun senĉesa plimultiĝo de la enspezo de kamparanoj, ili forte deziris plibonigi siajn loĝkondiĉojn. Sekve en la kamparo de Fengyang aperis vigla domkonstruado.

Iun posttagmezon, mi vizitis la vilaĝon Houyang kaj haltis antaŭ nova duetaĝa domo.

Tiu domo estis loĝata de du familioj. Mi eniris en la domon de kamparano Yang Jinli. Mi petis de li pardonon pro la de li neatendita vizito kaj diris mian intencon.

Yang Jinli estas altstatura. Li varme akceptis min. Antaŭ ol mi prezentis al li demandon, toronto da vortoj pri la konstruado de la domo jam elfluis el lia buŝo.

Li naskiĝis en malriĉa familio. En sia knabeco, kiam okazis natura katastrofo, li ofte iris al

urbo proksime de la gubernio Fengyang por almozpeti. Tra-noktante sub tegmentrando de riĉuloj, li ofte revis ke iutage ankaŭ li havos tian domon.


En la kvindekaj jaroj Yang Jinli konstruis por si pajlotegmentan domon kun tri ĉambroj. Tiam li planis ŝanĝi ĝin en brikon post 3 aŭ 5 jaroj. Sed lia familio ĉiam estis en malfacila vivstato, kiel ajn diligente li laboris. Pasis pli ol 20 jaroj, li ne nur ne povis konstrui por si deziratan brikdomon, sed eĉ ne havis monon por ripari la difektitan pajlotegmentan domon.

Kiam la produkta respondec-sistemo estis praktikata, li ricevis laŭ kontrakto 2.8 hektarojn da kampoj de la taĉmento por kulturi tritikon, rizon kaj kolzon. En 1981 li rikoltis 19 tunojn da greno, enspezis pli ol 9 000 juanojn en agrikultura kaj aliaj produktoj. Li bredis ĉ. 80 kokojn kaj anasojn, kies ovojam povis ĉiutage enspezigi al li ĉ. 5 juanojn. Tiujare li kaj lia onklo Yang Junzhi kune konstruis tiun domon, elspezinte po 6 800 juanojn.


La domo estas bela kaj fortika. Ambaŭflanke de la domo troviĝas po ŝtuparo kaj granda balkono kun arĝentaj ferbalustradoj en tri flankoj. La familio de Yang Jinli okupas du ĉambrojn en la dua etaĝo kaj tri en la teretaĝo kun totala plankareo de 85 kvadrataj metroj.

En la vilaĝo Houyang mi vidis pli ol dek kamparanajn familiojn konstruantajn tiajn duetaĝajn domojn. Poste Chen Tingyuan diris al mi, ke en la lastaj jaroj kamparanoj de Fengyang konstruis domojn kun pli ol 40 000 ĉambroj. Nun tia vicleco de domkonstruado estas videbla ĉie en Fengyang.

*Yang Jinli antaŭ sia nova domo*



# ABEL- BREDADO EN ĈINIO



**L**A abelbredado havas grandan ekonomian valoron. La abeloj ne nur produktas mielon, abelreĝinan gelaton, abelpolenon, abelvakson, abelvenenon kaj abelgluon kiel nutroriĉajn materialojn por la manĝaĵa kaj medicina industrioj, sed ankaŭ ludas gravan rolon en altigo de la kvanto kaj kvalito de la agrikulturaj plantoj per polenado. Tial la valoro de tiu afero estas kelkdekoble pli alta ol tiu de la abelaj produktaĵoj mem.

## DISVOLVIĜO DE LA ABELBREDADO

La abelbreda afero de Ĉinio havas historion de pli ol 2 000 jaroj. En la vasta teritorio de Ĉinio estas bredataj la ĉinaj abeloj (*Apis cerana cerana*). Antaŭe, pro la postĝinta tekniko, la produktokvanto de mielo estis malgranda. Tiam la abelbredado estis nur entreprenata kiel familia flankokupo. En la komenco de la kuranta jarcento estis enkondukitaj en Ĉinion ne nur la italaj abeloj (*Apis mellifera ligustica*), sed ankaŭ moveblaj dek-kadraj abelkestoĵoj kaj koncerna tekniko. De tiam la abelbredado kiel faka afero ek-

aperis, sed disvolviĝis malrapide.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, sub la forta subteno de la popola registaro la abelbreda afero de Ĉinio rapide marŝis antaŭen. En 1950 la nombro de esamenoj atingis 500 000 en la tuta lando kaj la jara produktokvanto de mielo 8 000 tunojn; en la sesdekaj jaroj ili nombris respektive tri milionojn kaj 30 000 tunojn; kaj nun ili estas respektive ses milionoj kaj 100 000 tunoj, kaj samtempe estas produktataj 2 000 tunoj da abelvakso kaj 300 tunoj da abelreĝina gelato. La nombro de esamenoj de Ĉinio nun okupas la duan lokon en la mondo post Sovetunio, kaj la eksportaj kvantoj de mielo kaj abelreĝina gelato okupas la unuan lokon en la mondo.

## SPECOJ DE ABELOJ KAJ ABELKESTOJ

La grandaj abeloj (*Apis dorsata*) kaj la malgrandaj abeloj (*Apis florea*) vivas en la tropika kaj subtropika zonoj de Azio. En Ĉinio ili vivas en Guangdong, Guangxi, Yunnan kaj Tibeto.

Tamen tiuj du specoj estas sovaĝaj. La ĉefa speco de abeloj bredataj en Ĉinio estas la ĉinaj abeloj. Antaŭe oni bredis ilin per kavaj trunkoj, bambuaj kaĝoj, lignaj bareloj kaj aliaj ujoj kaj la produktokvanto de mielo estis tre malgranda. Post kiam oni uzis modernajn abelkestoĵojn por bredi abelojn, la jara produktokvanto de mielo por ĉiu esameno leviĝis ĝis 10-50 kilogramoj. Nun en la tuta Ĉinio troviĝas du milionoj da esamenoj de la ĉinaj abeloj, duono el kiuj estas bredata en modernaj abelkestoĵoj.

Ĉinio enkondukis el eksterlande iujn bonrasajn abelojn, ekz. la italajn abelojn kaj la kaŭkazajn abelojn.

Normaj dek-kadraj abelkestoĵoj estas vaste uzataj por bredi okcidentajn abelojn. La kadro de la abelkesto estas 445 × 235 mm. kaj la kesto por konservi mielon estas samgrand-kadra profundkesto kun tabulo por izoli la abelreĝinon. En iuj abelbredejoj oni uzas longajn abelkestoĵojn kun 15-16 kadroj. Ĉar la ĉinaj abeloj estas iom malpli grandaj ol la italaj, tial ankaŭ la abelkestoĵoj

estas iom malpli grandaj por bredi la ĉinajn abelojn.

## NEKTARFONTOJ

La nektarfontoj de Ĉinio estas tre riĉaj kaj troviĝas pli ol 1 000 specoj de nektardonaj plantoj. El ili pli ol 20 specoj povas liveri grandan kvanton da komerca mielo. Ili estas kolzo, astragalo, eŭkalipto, robinio, jujubarbo, medikago, tilio, kotono, fagopiro, liĉiujo, longano, mandarinujo, sunfloro ktp.


Ĉinio estas tre vasta, tial inter la klimatoj de la sudo kaj la nordo estas granda diferenco. En nia lando ĉiam troviĝas lokoj kun florantaj vegetaloj, kio liveras taŭgan kondiĉon al polenkolektado de la abeloj. Ekz., en la provincoj Guangdong, Fujian, Guangxi kaj Yunnan la kolzo floras de decembro ĝis februaro de la sekva jaro, en la provincoj ĉe la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero — de februaro ĝis aprilo, en norda Ĉinio — en majo kaj en la provinco Heilongjiang — de junio ĝis julio. Dank' al tiaj kondiĉoj la abeloj povas esti bredataj en migrado. Tiamaniere la meznombra jara produktokvanto de mielo por ĉiu esameno povas atingi 50-60 kilo-

gramojn kaj la plej alta superas 100 kilogramojn.

## PRODUKTAĴOJ DE ABELOJ

Mielo estas natura dolĉaĵo nutroriĉa. Kaj kiel toniko ĝi povas stimuli digestadon, funkciojn de stomako kaj intestoj kaj reteni tusadon. Tial ĝi estas unu el la medikamentoj plej frue uzataj de ĉinoj. La ĉinaj piloloj estas preparitaj ĝuste el mielo kaj drogherba pulvoro. En la manĝaja industrio la mielo estas nemankigebla materialo por fari kukojn, bombonojn kaj malvarmajn trinkaĵojn. Krome oni vendas ankaŭ ladmielon. Ĉinio ĉiujare eksportas 40 000-60 000 tunojn da mielo al pli ol 30 landoj kaj regionoj, kiaj Japanio, Usono, Britio kaj Francio. La ĉina mielo estas multspeca kaj bonkvalita. La liĉia mielo estas speco propra al Ĉinio. Krome, ankaŭ la astragala, robinia kaj jujuba mieloj estas bonkvalitaj.

Abelreĝina gelato estas sekrecio produktata de langoglando (nutrohava glando) de abeloj kaj estas bona toniko kun ĉ. 30% da proteino kaj multaj specoj de aminoacidoj kaj vitaminoj. Ĝi povas stimuli digestadon, fortigi la sangokrean kapablon, kvietigi



*Scienca laboranto observas abelojn.*

dormadon, fortigi imunecon kontraŭ malsanoj kaj reguligi la fiziologiajn funkciojn. La abelreĝina gelato, abelreĝinaj tablojdoj, ginsengaj tablojdoj el abelreĝina gelato kaj abelreĝina belecokremo havas grandan debiton en- kaj eksterlande. La abelreĝina gelato estas uzata por prepari diversspecajn manĝaĵojn, ekz., medon. Nun Ĉinio ĉiujare eksportas ĉ. 100 tunojn da freŝa abelreĝina gelato al Japanio, Usono kaj sudorientaziaj landoj.

Abelgluo estas gumrezino kolektita de la abeloj de sur folioj, ĝermoj aŭ tigoj (aŭ branĉoj) de vegetaloj. Ĝi estas natura vegetala antibiotiko, kiu efikas en kontraŭinflamo, sendolorigo, anestezo, stimulo de sangecirkulado ktp. Abelveneno estas venena likvaĵo sekreciita el la venena glando de la abeloj kaj estas tre efika medikamento kontraŭ reŭmatismo kaj reŭmatisma artrito. Abelpoleno estas kolektita de la abeloj de sur la stameno de la floro. Ĝi estas masklaj ĉeloj de la vegetalo.

*Abelbredistoj en kolzkampo*



## SCIENCA ESPLORADO PRI ABELBREDADO

La Abelbreda Instituto de la Ĉina Akademio de Agrikulturaj

Sciencoj estis fondita en 1958. Ĝia ĉefa tasko estas esplori bredadon de la abelrasoj, abelbredajn teknikojn kaj koncernajn instalaĵojn, preventon kaj forigon de la malsanoj kaj fiinsektaj plagoj de la abeloj, nektardonajn vegetalojn kaj polenadon de la agrikulturaj plantoj per la abeloj. Krome, fondiĝis abelbredaj organizaĵoj ankaŭ en la akademioj de agrikulturaj sciencoj de iuj provincoj kaj urboj.

Ĉinio akiris certan atingon en la scienca bredado de abeloj. Ekz., oni vaste hibridigis la italajn abelojn kun la karniolanaj abeloj (*Apis mellifera carnica*) kaj plibonigis la abelbredajn teknikojn, tiel ke tre multe altiĝis la produktokvanto de mielo; dank' al kombinado de proluĝado de abelreĝina gelato kaj mielo pli multiĝis iliaj produktokvantoj; esplorinte la vivhistorion kaj generiĝon de la du fiinsektaj la aziaj akaroj (*Varroa jacobsoni*) kaj malgrandaj akaroj (*Tropilaelaps clareae*), oni ellaboris sintezan rimedon por preventi la plagon kaj elimini ilin; kaj en esplorado pri la nektardonaj vegetaloj oni enketis iliajn specojn, nombrojn, floradtempojn kaj nektardonan kvanton, kio metis la bazon por fari la planon pri la abelbreda afero.

Ĉinio akiris bonan progreson ankaŭ en kuracado de diversaj malsanoj per abelaj produktaĵoj. En Jiangsu-provinco de Ĉinio fondiĝis medicina instituto, kiu esploras kuracadon de malsanoj per abelaj produktaĵoj. La laborantoj pluapaŝe studas pri la farmakologio de la abelaj produktaĵoj por servigi ilin pli bone al la homaro.

# Kelkaj notoj pri la filatelo en Ĉinio

de HONG YING

**D**EPOST kiam unua poŝtmarko de la mondo estis emisiita en Britio en la kvardekaj jaroj de la 19-a jarcento, filatelo furoris en la mondo kiel unu el la kulturaj amuzoj. La filatelo en Ĉinio estas pli juna. La Poŝtmarka Studrondo Shenzhou de Sanhajo fondita en 1922, la Ĉina Poŝtmarka Filatela Asocio kaj la Filatela Asocio Xinguang fonditaj en 1925 estas ĉinaj filatelistaj asocioj plej frue konitaj de la mondaj filatelistoj.

## KRESKANTA VICARO DE FILATELISTOJ

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, kun la progreso de la ekonomio kaj kulturo de la socio, filatelo populariĝis tra la tuta lando. Nekompleta statistiko diras, ke la nombro de filatelistoj en la tuta Ĉinio superis milionon, la filatelistoj troviĝas ne nur en grandaj urboj, sed ankaŭ en urbetoj, vilaĝoj kaj landlimaj regionoj; kaj tiun aktivadon partoprenas ne nur intelektuloj, sed ankaŭ laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj lernantoj. La gubernio Huaide de la provinco Guangdong havas 400 000 loĝantojn, inter kiuj kvarono estas filatelistoj. Ĉinio havas landan organizon la Ĉina Filatelistasocio, kaj ankaŭ diversaj lokoj havas siajn lokajn filatelistajn organizojn, kaj eĉ iuj institutoj kaj fabrikoj havas tian organizon.

## PLEZURO POR LA TUTA VIVO

En somero de 1982 okazis en Pekino la Unua Tutlanda Kon-

greso de Filatelistoj. Inter la kongresanoj estis kaj dekkelkjaruloj kaj landfamaj filatelistoj. 74-jara s-ro Ma Renquan estas unu el tiaj fakuloj. En la pasintaj dekoj da jaroj, ĉiutage li elspezis certan tempon por filatelo, eĉ kiam li estis tre okupita.

En sia lernejaneco li jam ekŝatis filatelon. Diplomite de supera lernejo, li fariĝis komercisto, kaj dum sia kariero li kolektis grandan kvanton da tre valoraj ĉinaj kaj fremdlandaj poŝtmarkoj. Liaj poŝtmarkoj estis ricevitaĵoj pere de korespondo, interŝanĝo aŭ aĉeto. Nun en la mondo ekzistas unika ruĝa ĉina poŝtmarko kun malgranda unudolara stampo emisiita de Qingdinastio en 1897. Ĝi estas la plej rara ĉina poŝtmarko. Ĝi naŭfoje ŝanĝis sian mastron kaj en 1944, ĝi estis aĉetita de Ma kontraŭ 1 000 usonaj dolaroj. En julio de 1956 li donacis la poŝtmarkon kaj aliajn sume 6 166 valorajn poŝtmarkojn al la ŝtato. Rekompenca al lia ofero, la ĉina registaro honoris lin per honorates-tilo, premio kaj memoraĵoj.

83-jara Zhangbao Zijun, prezidanto de la Filatelistasocio de Hangzhou, komencis filatelon antaŭ 73 jaroj, kaj nun li posedas dekmilojn da poŝtmarkoj. Li ricevas grandan ĝuon en filatelo kaj ofte diskutas kun aliaj filatelistoj ĝis profunda nokto. Li de tempo al tempo verkas artikolojn por la gazeto "Filatelo" kaj korespondas kun multaj eksterlandaj filatelistoj por interŝanĝi sperton pri la fako.



*Ili aĉetas unuataĝan koverton.*

Demandite, ĉu li laciĝas de tio, li respondis: “Mi kolektas poŝtmarkojn dum mia tuta vivo kaj el tio mi ricevis plezuron.”

### “ENCIKLOPEDIETO”

La kolektoj de iuj filatelistoj de Ĉinio meritas la nomon de “enciklopedieto”. Filatelisto Zhang Wenguang kolektis pli ol centmil pecojn da ĉinaj kaj alilandaj poŝtmarkoj pri astronomio, geografio, pejzaĝoj, moroj, internacia politiko, historio, ekonomio, famuloj, famaj verkoj, kulturo, arto, sporto, higieno, scienco, tekniko, religio, fabeloj k.a. Foliumante la albumojn de tiu ĉi maljuna filatelisto, oni sentas kvazaŭ ili vojaĝus en kosmoŝipo tra la universo, flugante de la prahistoria tempo al la nuntempo kaj la estonto.

Instruisto Liang de la biologia fakultato de la Kantona Normala Instituto interligas sian filatelon kun la instruado. Li kolektas precipe diverslandajn poŝtmarkojn kun raraj bestoj aŭ vegetaloj, ekzemple ĉinaj poŝtmarkoj kun granda pando kaj orhara simio, aŭstraliaj poŝtmarkoj kun ornitorinko, kanguruo, koalo, novzelandaj poŝtmarkoj de sfenodonto. Pere de tiuj poŝtmarkoj la studentoj akiris pli da scioj pri animaloj kaj vegetaloj.

### EKSPOZICIOJ DE POŝT-MARKOJ

Por vigligi la filatelan aktivadon kaj riĉigi la kulturan vivon de la popolo, ĉinaj filatelistaj organizoj ofte okazigas ekspozicion de poŝtmarkoj. En 1981 oni aranĝis en Pekino ekspozicion, en kiu montriĝis preskaŭ mil pecoj da objektoj pri la ĉina poŝta historio kaj pli ol tri mil poŝtmarkoj emisiitaj en Qingdinastio (1644—1911), tiuj en la periodo de la Respubliko de Ĉinio (1911—1949) kaj tiuj de la Liberigitaj Regionoj kaj la nova Ĉinio. La ekspozicio de poŝtmarkoj kolektitaj de privatuloj aranĝita en Kantono montris tridek mil poŝtmarkojn kun 58 fakaj temoj kaj samtempe ankaŭ unuataĝajn kovertojn, limigitajn poŝtkartojn, stampojn, filatelajn revuojn k.a.

En novembro de 1982, oni aranĝis en la Belarta Domo de Pekino poŝtmarkan ekspozicion de privataj kolektoj sub la titolo “Granda Patrio, Aminda Pekino”. La ekspozicio spegulis la longan historion kaj la brilegan kulturon de la ĉina nacio kaj figure montris la socialisman konstruadon de la ĉina popolo. En la sama monato, laŭ la peto de Ĉinio, Aŭstralio aranĝis en Pekino, Tianjin kaj Ŝanhajo

poŝtmarkan ekspozicion de famaj filatelistoj, kiuj ebligis al la rigardantoj vidi en la poŝtmarkoj la frutempan historion de Aŭstralio, ĝiajn morojn kaj pejzaĝojn, rarajn animalojn kaj vegetalojn. La ekspozicion vizitis centmil personoj.

### KULTURI BONAN MORALON DE FILATELISTOJ

En la lastaj jaroj multe da gejunuloj kaj geknaboj fariĝis filatelistoj. Dank’ al filatelo multe vastiĝis ilia vidkampo kaj altiĝis ilia moralo. Ekzemple, junulino Lan Yu de Ĝuang-nacieco fariĝis sperta filatelistino en sia aĝo de 20 jaroj, kiam ŝi ekvizitis la meĥanikan fakultaton de la Guanghi-a Universitato. En ne tre longa tempo ŝi jam sukcesis kolekti multajn poŝtmarkojn emisiitajn en la periodo de Qingdinastio ĝis la nuna tempo. Cetere ŝi havas poŝtmarkojn de pli ol cent landoj. Ŝi ofte helpas aliajn per prezento de sia sperto pri filatelo aŭ dono de siaj superflujaj poŝtmarkoj.

Sed iuj gejunuloj kaj geknaboj fariĝis maniuloj de filatelo. Ili pasumas tuttage sur stratoj por fari “negocojn” pri poŝtmarkoj kaj pro tio ili maldiligentiĝis en lernado aŭ en sia laboro, kelkaj eĉ fariĝis krimuloj.

Por helpi la junulojn ĝuste kompreni la signifon de filatelo, la Ĉina Filatelista Asocio aktive faras propagandon pri filatelista moralo. Iuj kulturaj gejunuloj aŭ geknabaj domoj donas direkton al gejunuloj en filatelo.

Ankaŭ maljunaj filatelistoj fervore helpas junajn filatelistojn, por ke ili riĉigu siajn sciojn, levu la estetikan juĝpovon kaj havu bonan moralon en kolektado de poŝtmarkoj.



# Filatelistoj de Pekino

Fotoj de WANG JIANZHONG

Lastatempe pli kaj pli vigliĝas filatelado de pekinanoj. En iuj fabrikoj kaj lernejoj fondiĝis filatelistaj grupoj. Filatela ekspozicio estis okazigita de la Filatelista Asocio de Pekino en la Ĉina Belarta Domo. Iuj radiostacioj, televidstacioj kaj filatelaj gazetoj ofte konigas fundamentajn sciojn kaj informojn pri filatelado. La bele presitaj diversspecaj memorigaj poŝtmarkoj, emisiitaj de la ĉina poŝta kaj telekomunika departemento estas tre ŝatataj de en- kaj eksterlandaj filatelistoj.



Poŝtmarka vendotablo de la Ĉina Poŝtmarka Kompanio



Ili stampas unuafagajn  
kovertojn.



Malgrandaj filatelistoj




Poŝtmarko (unu peco) pri la Internacia Provizo de Trinkakvo kaj Media Higieno en la Dek Jaroj (1981-1990)



Poŝtmarko (unu peco) pri la 100-a Datreveno de la Malkovro de Tuŝerkulozaj Baciloj Far d-ro Robert Koch



Speciala poŝtmarko (unu peco) pri 1983, la jaro de porko, laŭ la lunkalendaro de Ĉinio




Speciala poŝtmarko (unu peco) pri la "Kolektiĝo" de la Naŭ Planedoj


**KOLORA INFANLIBRO  
PREMIITA**

**EN LA INFANLIBRA KONKURSO DE 1982**

# **Pesi Elefanton**



En la antikveco ne ekzistis granda pesilo. Kiamaniere oni povis mezuri la pezon de elefanto? Iun bonan rimedon, kiun elpensis sepjara infano, vi trovos en la kolora infanlibro "Pesi Elefanton". La libro enhavas sep mallongajn rakontojn pri saĝaj kaj diligentaj infanoj, kiuj poste fariĝis eminentuloj. Ĉiuj rakontoj estas pentritaj en la ĉina stilo.



**ELDONITA DE "EL POPOLA ĈINIO"**

**Numero: 88-Es-181P Formato: 180×205mm. 91 pĝ. Prezo: £1.60 US\$3.30**

**Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Peranto de EPC**

**aŭ Esperanta Sekcio de la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj  
(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



WU CONGJU:

# *Librovendistino*

(NOVELO)

**E**N nia urbeto estas nur unu librovendejo, kie laboras unusola vendistino.

Kiom da jaroj ŝi laboris tie? Neniu scias. Ŝajne, kiam ekfunkciis la vendejo, ŝi jam estis tie. Maljunuloj memoras, ke tiam ŝi estis ĝentila knabino ĵus fininta sian studon en lernejo, ŝi ĉiam portis ridantan mienon kaj havis post sia kapo paron da kornoformaj harligetoj.

Ŝi estas tre okupita de ĉio en la librejo: aĉeti, vendi, porti librojn al kamparo, fari mendon, kalkuladon, purigadon de la ĉambro. . . Ĉu ŝi sola povas plenumi tiel multajn laborojn? Pri tio neniu serioze pensis. Efektive ŝi pasigis tiom da jaroj ĝuste en tia okupiteco. Sed kiel ŝi plenumis tiujn laborojn? Neniu sciis kaj atentis.

Tempo flugas sage. Nun multaj knabinoj, kiuj siatempe legis bildlibretojn venditajn de ŝi, jam fariĝis patrinoj, kaj eĉ iliaj infanoj ne plu interesiĝas pri bildlibretoj, sed legas dikajn romanojn. Same kiel homa vivo la libroj sur la bretaro spertis multajn ŝanĝiĝojn. Malgraŭ tio ili tamen fariĝas ĉiam

pli multaj, tion certigas la diversaj titoloj kaj kovriloj en malsamaj stiloj montritaj en la vendejo.

Laŭ aspekto nia heroino aĝas ĉ. 50 jarojn. Malklare videblas sulketoj sur ŝia frunto kaj ĉe ŝiaj okulanguloj. En ŝiaj okuloj oni legas simplanimecon kaj sincerecon. Eble ĝuste pro tio timemaj maljunaj ovovendistinoj kuraĝas enpaŝi en la vendejon por tie ripozi, babili kaj peti de ŝi trinkakvon. Ili restigas plenmanojn da freŝaj jujuboj aŭ kratag-fruktoj sur la vendotablo. En la kontaktado ŝi gajnis al si ilian konfidon.

Iutage venis en la librejon juna homo.

Estis ĝuste la horo, kiam mankis aĉetantoj en la vendejo. Nia vendistino estis leganta la ĵus ricevitan ĵurnalon, sin apogante sur la vendotablo. Vidinte la veninton, ŝi stariĝis kaj demandis: "Ĉu vi volas aĉeti libron?"

"Ne, mi volas rigardi unue," respondis la inteligenta junulo. Liaj okulvitroj montris, ke li multe legis.

"Bonvolu doni al mi tiun libron," diris li, montrante libron kun formato de 18 x 11 cm, meze sur la bretaro. Ĝi estis poemaro bele bindita kun la titolo "Infano kaj Libroj".

"Ĉu vi legis ĝin?" li demandis, karesante la libron.

"Ne," ŝi iom hontis. Vere, ŝi vendis multe da libroj, tamen ŝi legis malmulte pro troa okupiteco. Ĝenerale ŝi povis nur foliumi la nove aĉetitajn librojn, rigardi iliajn kovrilojn, konci-zajn prezentojn pri la enhavoj, ilustraĵojn kaj prezojn por rekomendi al klientoj. Ŝi tre bedaŭras, ke klientoj, precipe vilaĝaj infanoj, aĉetas ne konvenajn librojn, ĉar iliaj moneroj estas ŝparitaj el la monsumo de la patrinoj por aĉeti ĉiutagajn vivbezonaĵojn.

La junulo, verŝajne, ne rimarkis ŝian konfuzon kaj daŭre demandis: "Ĉu ĝi havas grandan debiton?"

"Jes. Mi aĉetis 50 ekzemplojn kaj ili baldaŭ elĉerpiĝos," ŝi respondis rapide. "Ĝin aĉetas ĉefe mezlernejoj kaj iliaj instruistoj. Oni diris al mi, ke ĝin

rekomendis ĵurnalo,” ŝi aldosis.

“Ĉu . . . Ĉu vi konas min?” subite li elbuŝigis tiun demandon kun okuloj fiksitaj sur ŝi.

Ŝi stuporiĝis, atente rigardis lin esperante ke la rememoro ŝin helpos, sed vane.

La junulo ekridis. Li ridis mallaŭte kaj ĉarme. “Vi estas tre bonkora. . .” Tion dirinte, li demetis la poemaron kaj prenis el sia sako libron kaj etendis ĝin al ŝi: “Jen mia donaco al vi.”

Ŝi stuporiĝis. “Kial li donacas libron al mi?”

Ĉar ŝi ne akceptis, li do metis la libron sur la tablon kaj, fikse rigardante ŝin, diris: “Ĉu vi ankoraŭ memoras knabon, kiu ŝtelis libron antaŭ 15 jaroj?” Li momenton haltis, eble por veki ŝian rememoron. “Li ŝtelis vian libron, sed vi ne batis lin. Male, vi pagis la monon kaj donis la libron al li. . . Vi donis al li ankaŭ du pecojn da kukoj, gla-



son da akvo kun sukero. . . Tiam li estis tre malsata, vere kompatinda. . .”

Liaj vortoj fine vekis ŝian rememoron pri la okazintaĵo. Antaŭ 15-16 jaroj, iutage, kiam ŝi faris purigadon ĉe la pordo, subite aŭdiĝis mallaŭta bruo. Ŝi pensis ke tie moviĝas musoj, sed musoj ne bruas tiel laŭte. Ŝi do eniris. Ha, iu malpura knabo kun taŭzitaĵoj kaj ŝvita vizaĝo, elprenis ekzempleron el libropako kaj haste kaŝis ĝin en sian sinon. Ĉe tio ŝi ektusis. Sed anstataŭ foriri, li levis sian kapon. Ŝi vidis liajn timemajn okulojn. . . Ŝi tamen ne riproĉis lin, kiel li diris, sed donis al li tiun libron kaj mem pagis la monon. Ŝi memoris ke la libro estis “Ojstro”. Li estis forte kortuŝita kaj ekploris. Li diris, ke li ne havas monon, sed ŝatas legi. Aŭdinte tion, ŝi ameme forviŝis ŝviton de sur lia vizaĝo, elektis kelke da libroj kaj donis al li, kun iom da mono kaj manĝaĵoj. De tiam li ne plu montriĝis. Kvankam ŝi iam ekmemoris lin, tamen post dekkelkaj jaroj la memoro jam malklariĝis. Ĉu tiu, kiu nun staras antaŭ ŝi, estas ĝuste li?

Kiam ŝi vekigis el la rememoro, ŝi trovis, ke la junulo jam foriris. Ŝi haste eldomiĝis kun deziro revenigi lin kaj demandi pri lia stato. Tamen sur la mallonga strato ne videblis eĉ lia ombro. Ŝi revenis kaj kun miro trovis, ke la libro, kiun la junulo restigis al ŝi, estas ĝuste la sama poemaro “Infano kaj Libroj”.

Ŝi malfermis la libron kaj vidis elegantajn skribaĵojn sur la titola paĝo.

Onjo,

Eble vi ankoraŭ memoras tiun knabon, kiu ŝtelis de vi

libron. Mi donacas al vi la libron, verkitan de mi mem, pri vi, mi kaj libroj.

Nun mi estas poeto. Sed sen vi, mi restus knabo ŝtelanta libron.

Instruate de vi, mi fariĝis vera homo.

Eble vi delonge forgesis min, kio montras nur vian noblecon.

Nobla homo ne memoras sian bonfaron, kio ĝuste montras lian noblecon.

Libroŝtelinto, libroamanto kaj verkinto de la poemaro

Ŝi forte miris. “Ho, li estas poeto!” En la okuloj de ŝi kaj loĝantoj de la urbeto poeto estas sama kiel Apolono en la okuloj de la helenoj. Kaj krome lia sukceso koncernas ŝin, tion ŝi eĉ kredi ne kuraĝas.

“Mi volas libron. . .” eksonis infana voĉo de apud la vendotablo.

Ŝi sin klinis kaj vidis knabine-ton altan je malpli ol unu metro, kun kelke da moneroj en dika maneto. Ŝi montris bildlibreton en la vitroŝranko per la alia. La vendistino tuj akceptis tiun etulinon. “Eble ankaŭ ŝi fariĝos poeto. Estos bone, eĉ se ŝi ne verkos poemon, sed fariĝos bonedukita kaj klera.” Ŝi tre ĝojas je tiu penso. Ŝi sentas grandan honoron kaj konsolon pro tio, ke el ŝiaj klientoj aperis poeto, kiu rilatas kun ŝi. Ŝi ĝojas, kvaŭ ŝi mem fariĝus poeto.

Aŭdiĝas el ekstere bruego de geknaboj. Ŝi scias, ke finiĝis lecionoj en la lernejo kaj venas al ŝia vendejo aro kaj aro da malgrandaj aĉetantoj.

Ilustritaj de **Sha Gengshi**

# LA UNUA INTERNACIA TURISMA KONGRESO EN ĈINIO

**D**E la 28-a de februaro ĝis la 4-a de marto la Ĉina Vojaĝa kaj Turisma Administra Buroo kaj la Civila Aviada Administracio de Ĉinio kune okazigis la Unuan Internacian Turisman Kongreson en Pekino por akceli kontaktiĝon, amikecon kaj kunlaboron kun diverslandaj turismaj rondoj kaj disvolvi la turisman aferon de Ĉinio. La kongreson ĉeestis amikoj kaj reprezentantoj el Egiptio, Nepalo, Hispanio, Usono, Britio, Japanio, Francio, Hungario, Singapuro, Tajlando kaj aliaj 35 landoj kaj regionoj kaj respondeculoj de diverslokaj

turismaj administracioj de Ĉinio, sume pli ol 1 200 personoj.

En sia inaŭgura parolo Gu Mu, ŝtata konsilanto de Ĉinio, diris ke persiste praktiki la malferman politikon al fremdaj landoj kaj rapidigi disvolvon de nia turisma afero estas grava principo de la ĉina registaro. En la kongreso Robert C. Lonati, sekretario de la Monda Turisma Organizo antaŭdiris en sia parolado, ke la kongreso helpos malfermi interesan merkaton de la enlanda kaj internacia turismo.

Dum la kongreso reprezentan-

toj de pli ol 400 turismaj servoj faris vastan kontaktiĝon kaj fakan interparolon kun reprezentantoj de turismaj kaj civil-aviadaj departementoj de Ĉinio. Ankaŭ reprezentantoj de Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj, kiuj venis al Ĉinio unuafoje en la lastaj 20 jaroj, havis amikan interparolon kun ĉinaj turismaj reprezentantoj. Ili esprimis sian deziron denove disvolvi turisman interŝanĝon. Hungara reprezentanto decidis ĉi-jare organizi turisman grupon al Ĉinio.

La kongreso ankaŭ aranĝis ekspozicion pri la ĉina turismo. En la halo kun plankareo de

*Representantoj de FR Germanio faras fakan interparolon kun ĉina reprezentanto.*



*Representantoj balotas por juĝi 2 000 metiartaĵojn kaj turismajn memoraĵojn.*




3 000 kvadrataj metroj estis eksponataj grandaj koloraj bildoj kaj fotoj, vivoveraj modeloj kaj vidbendaj projekcioj, kiuj konigis diversajn turismajn lokojn kaj instalaĵojn de Ĉinio. En la halo eksponiĝis ankaŭ ĉ. 2 000 metiartaĵoj kun nacia gusto kaj turismaj memoraĵoj. Nuntempe, fremdlandaj turistoj povas vojaĝi al 135 ĉinaj urboj kaj lokoj en 26 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj.

Post la kongreso multaj amikoj kaj reprezentantoj veturis en pluraj grupoj al diversaj turismaj lokoj de Ĉinio por fari esploran vojaĝon.

*Jurnalistoj intervjuas hungaran reprezentanton.*



*Mongola knabino prezentas silkan rubandon al s-ro Robert C. Lonati por esprimi sian respekton.*





*Reprezentantoj aĉetas memoraĵojn en la ekspona halo.*

*Reprezentantoj en jurto starigita en la ekspona halo*





# Historiaj meritoj de la Tri Regno

de BA HONG

**K**VANKAM la unuaj imperiestroj de la tri regnoj Wei, Shu kaj Wu fondis sian regadon en parto de Ĉinio, ili tamen pene administris sian regnon por unuigi la tutan Ĉinion. Tio estis objektive favora al la ekonomia disvolviĝo kaj antaŭenpuŝis la ĉinan socion.

## POLITIKO ORGANIZI KAMPARANOJN POR TERKULTURADO

La malordo kaŭzita de Dong Zhuo malhelpis la produktadon en la baseno de la Flava Rivero, pro kio la popolo suferis de malsatego. Kiam la imperiestro Xiandi de la Orienta Han-dinas-

tio revenis al la ĉefurbo Luoyang, li povis loĝi nur en provizora budo. Pro manko de greno liaj sekvantaj korteganoj devis kolekti manĝeblajn herbojn en la antaŭurbo por mildigi la malsaton. La soldatoj, kiuj iris al Xuchang sub la komando de Cao Cao por venigi la imperiestron Xiandi, ankaŭ suferis de malsato survoje kaj estis devigitaj sin nutri per morusberoj, anodontoj kaj limneoj.

Tiam Zao Qi kaj aliaj subuloj de Cao Cao proponis al li, ke oni organizu kamparanojn en terkulturado por likvidi la malsategon, t. e. grupigi dekojn da kamparanoj en la armea formo

kaj nomumi ŝtatan oficiston por administri la terkulturadon. Se kamparanoj uzis ŝtatajn bovojn en terkulturado, ili devis pagi al la ŝtato ses dekonojn de la rikoltita greno. Kiuj uzis sian privatan bovon en terkulturado, devis pagi al la ŝtato nur duonon de la rikoltita greno. La grupigitaj kamparanoj estis malpermesitaj forlasi laŭplaĉe la difinitan teron, kaj la registaro ne rekrutigis ilin. Sen militado ankaŭ la soldatoj partoprenis en terkulturado. Post kiam la politiko estis praktikata, la dezertaĵkampoj estis ekspluatitaj, la armea provianto pliiĝis kaj eĉ en iuj regionoj la grenejoj estis



plenplenaj. Iom post iom vigliĝis la subfosita ekonomio en la baseno de la Flava Rivero.

Cao Cao tre zorgis pri la agrikultura produktado, li kategorie malpermesis al la armeanoj treti plantidojn. Kiu malobservis tion, devis esti senkapigita. Iufoje, en militiro la ĉevalo de Cao Cao estis surprizita de subite elfluganta turto kaj tretis kurante tritikan kampon. Cao Cao tuj deĉevaliĝis kaj petis la koncernan oficiron laŭleĝe lin puni. La oficiro diris: "Surprizite, via ĉevalo entrudiĝis en la tritikan kampon, kio estis tute neatendita kaj kontraŭ via volo. Krome, vi estas ĉefkomandanto, tial vin ne koncernas la kriminala kodo." Cao Cao diris: "Ĉu mi rajtas malobservi la leĝon, kiun mi mem ellaboris?" Tion dirinte, li demetis sian ĉapon, fortranĉis de sia kapo faskon da haroj kaj diris: "Mi min punu per har-tranĉo anstataŭ min senkapigi!" Tio rapide disaŭdiĝis en la tuta armeo kaj ĉiuj

soldatoj kaj oficiroj estis mirigitaj senescepte.

La ekonomia revigliĝo de Wei-regno metis bazon por unuigi la tutan Ĉinion.

### MILITIRO AL LA SUDO KAJ NORDO

Liu Bei mortis tri jarojn post sia surtroniĝo kaj lia filo Liu Chan heredis la tronon. Liu Chan estis sentaŭgulo, sed lin helpis eminenta politikisto Zhuge Liang. En la jaro 223 p. K. okazis armita ribelo de nacimalplimulto en Nanzhong-regiono de Shu-regno. Zhuge Liang decidis unue kvietigi la ribelon kaj poste militi kontraŭ Wei-regno. Al Wu-regno Zhuge praktikis daŭre pacan politikon.

Nanzhong estas la nunaj Yunnan- kaj Guizhou-provincoj, en sudokcidenta Ĉinio, kie loĝis pluraj nacimalplimultoj.

La ĉefo de la ribeluloj Meng Huo faris reziston profitante la favoran terenon. Spite al dan-

ĝeraj vojoj, la trupoj de Shu enpenetriĝis en la montaron. Meng Huo komandis siajn trupojn por rezisti. En batalo la Shu-trupoj ŝajnis sin venkitaj kaj retiriĝis. Meng Huo kun siaj trupoj postkuris ilin kaj falis en la embuskon de la lasta. Li estis kaptita.

Zhuce Liang regalis la kaptitan Meng Huo per bankedo kaj invitis lin rigardi la formacion de Shu-trupoj. Meng Huo admiris en la koro, ke la armeo de Shu havas bonordan formacion kaj severan disciplinon. Tamen efektive li ne konfesis sian malvenkon. Li diris: "Mi ne estas venkita en la batalo. Vi kaptis min nur per via ruza embusko. Viaj trupoj estas nur ordinaraj, se ni refoje faros batalon, ni gajnos la venkon." Zhuce Liang kun rideto diris: "Se tiel, mi do liberigos vin. Reordigu viajn trupojn kaj denove faru batalon kontraŭ ni."

Reveninte, Meng Huo manovris siajn trupojn kaj faris sinsek-



vajn batalojn kontraŭ la trupoj de Zhuge Liang. Li estis kaptita sepfoje. Kiam Meng estis kaptita sepafoje, Zhuge Liang ankoraŭ intencis liberigi lin, sed Meng Huo ne volis foriri. Nudigante sian brakon kaj genuante surtere laŭ sia nacia moro, li diris kun larmoj: "Via ĉefministra moŝto havas mirinde grandajn fortojn, ni ne plu ribelos!" Zhuge Liang kvietigis la regionon Nanzhong kaj nomumis lin regiona reganto.

Venke reveninte, Zhuge Liang komencis prepari norden-militiron. De 228 ĝis 234 p. K., li sesfoje atakis Wei-regnon, sed malsukcesis. En la lasta militiro Zhuge Liang malsaniĝis de troa laciĝo kaj mortis en Wuzhangyuan (sudokcidente de la nuna Meixian-gubernio, Shaanxi-provinco).


En 263 p. K. kiam la armeo de Wei-regno atakis Shu-regnon, la senkapbla regnestro Liu Chan kapitulacis.

## EKSPLUATADO DE YIZHOU

Kiam la regnoj Shu kaj Wei estis en batalado, la regnestro Sun Quan de Wu ekspluatis la sudorientan parton da sia lando (la nunaj provincoj Jiangsu kaj Zhejiang). Tie Sun Quan disvastigis avangardajn agrikulturan teknikon kaj kulturon kaj per tio ŝanĝis la tiean postĝintan fizionomion.

Estis tre avangarda la ŝipfardo de Wu-regno. Tiam ĝi povis fari 500-tonelan ŝipon kvinetaĝan kaj longan 50 metrojn, kiu povis enteni ĉ. 600 homojn. La plej granda ŝipo povis enteni pli ol 3 000 homojn.

Kun la progreso de la ŝipfara tekniko, vigliĝis ankaŭ la surmara trafiko. La oceana ŝiparo



**Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

**\* Eldonejo k. Librejo Sonorilo aspc**

Eldonejo k. Librejo Sonorilo estas la sola oficiala Esperanto-Libroservo en Belgio (Belga Ŝtatgazeto: 05-07-1962 — n-ro 3229). Aliaj libroservoj EBLE havas la libron, kiun vi serĉas, sed la librejo de **Eldonejo k. Librejo Sonorilo** havas ĝin CERTE,

kondiĉe ke la koncerna eldonaĵo ankoraŭ entute estas akirebla. Tio estas la diferenco, kiun necesas memori antaŭ ol direkti sian libromendon ien. Ni havas ankaŭ malaltajn sendokostojn kaj vendoprezojn. Mendu ĉe Eldonejo k. Librejo Sonorilo, Sekcio k. Librejo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk (Antverpeno) Belgio.

\* Kampanjo por pligi esperantlingvan radioelsendadon. Ĉiuj esperantistoj skribu al elsendoj kaj demandu kial ili ne disaŭdigas en la lingvo internacia. Por pliaj informoj skribu al: Elsendadokampanjo, Kalle Kniivila, Museokatu 3, 83500 Outokumpu, Finnlando. Laŭeble sendu respondkuponon por la afranko.

\* Pilar Valenzuela (21j. studentino) dez. kor. kun ĉinaj geesp-istoj pri vivmaniero, turismo, politiko, literaturo, ktp. Libertad 162, Lima 4, Peru. Skribu al mi!

\* **Volapük-literaturo** serĉata. Ofertojn sendu al: SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt. FR. Germanio.

de Wu-regno iam atingis Funnan (Kamboĝo), Linyi (suda Vjetnamio) kaj nordorientan Ĉinion. En la havenoj de Wu-regno ankris ŝipoj venintaj el Persio (Irano), Tianzhu (Hindio) kaj sudorienta Azio. Ankaŭ komercistoj de Daqin (Romanio) venis post multaj klopodoj al Jianye (la nuna Nankino), la ĉefurbo de Wu-regno.

Trafite de uragano ĉe surmara navigacio Wu-regnanoj iam flosis al Yizhou (la nuna Taiwan-provinco) kaj Danzhou (Japanio). Ankaŭ popoloj de Yizhou venis al Guiji de Zhejiang pro negoco. En 230 p. K. Sun Quan sendis ŝiparon kun pli ol 10 000 homoj komandataj de generaloj Wei Wen kaj Zhuge Zhi por serĉi Yizhou kaj Dan-

zhou. Naviginte plurajn tagojn la ŝiparo ne trovis Danzhou, sed atingis Yizhou. Kaj tiel miloj da tieaj loĝantoj sekvis la ŝiparon kaj venis al la kontinento.

La popoloj de Yizhou estis prapatroj de la nuna Gaŭŝan-nacieco. De tiam plue disvolviĝis la ekonomia kaj kultura rilato inter Yizhou kaj la kontinento.

Fakte, jam en ankoraŭ pli frua tempo popoloj de la kontinento atingis la transmaran Yizhou. La neolitikaj objektoj elterigitaj en Taiwan tre similas al tiuj en la sudorienta marborda regiono de Ĉinio. Tio montras, ke la neolitika kulturo de Taiwan havis rektan rilaton kun tiu de sudorienta Ĉinio.

Ilustritaj de **Wu Shousong**

# Mongoloj kaj ĉevaloj

de YING YI



*Zhongdai*

ĈEVALO estas nedisigebla kunulo de la mongoloj, kiuj vivas de generacio al generacio sur la vasta stepo de la Interna Mongolio en la norda landlima regiono de Ĉinio. Septembre de la pasinta jaro mi faris viziton en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. La kutimoj de mongoloj pri bredo, ŝato kaj dreso de ĉevaloj multe interesis kaj profunde impresis min.

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio havas areon de pli ol 1 100 000 kvadrataj kilometroj, kiu konsistigas okonon de la totala areo de Ĉinio. Sur ĝia vasta stepo kun areo de pli ol 800 000 kvadrataj kilometroj

kreskas herboj multspecaj kaj bonkvalitaj. La tieaj mongoloj vivas nomade generacion post generacio. Nun, kun la antaŭenmarŝo de la epoko, la maljunuloj kaj infanoj, kiuj ne partoprenas en brutobredado, jam ne plu bezonas migri kune kun sia brutaro kaj vivas en fiksa restadejo. Tamen la paŝtistoj ankoraŭ devas tutjare moviĝi kun siaj jurtoj sur la senlima stepo. Sendube, tiu specifa medio kaj vivmaniero estas la kaŭzo, kial ili ĉiam vivas kun ĉevaloj kaj tiel ŝatas ilin.

La mongolaj ĉevaloj kuras tre rapide. Kun tia ĉevalo la mongoloj, kiuj kreskas sur la dorso de ĉevalo, sentas grandan fieron.

Ĉiu eminenta paŝtisto devas esti lerta en rajdado, arkopafado kaj dresado de eksplodemaj ĉevaloj.

Kiam mi veturis per trajno de Pekino al Huhhot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, ĝuste tiam okazis tie kunveno de tradiciaj sportoj de la ĉinaj nacimalplimulto, kiu havigis al mi bonan ŝancon vidi la brilan rajdarton de mongolaj sportistoj.

En la sportejo ĉiuj ĉevaloj galopis kiel pafita sago. Estis pli mirige, ke rajdistoj faris surĉevalo diversajn akrobatajn, kiel stari sur la manoj, kuŝi horizontale sur galopantaj ĉevaloj. La sportistoj ankaŭ prezentis rajdadon de duopo sur unu ĉevalo, kvinopo sur tri ĉevaloj kaj unuopo sur du ĉevaloj. La rigardantoj estis forte ravitaj de iliaj kuraĝo, vikleco kaj danĝeraj movoj, kaj de tempo al tempo eksplodis huraoj kaj aplaŭdoj. Estis aparte brila la rajdarto de la mongola rajdistino Siqin Gao-wa. Ŝiaj surĉevalaj akrobataj movoj estis elegantaj, kaj ŝi tiel facilmove faris diversajn saltojn surĉevalo kiel ŝi faris gimnastikajn movojn surtere. Intensa konkurso iris inter poloaj tea-



*Zhongdai kaj liaj familianoj*


moj. La furioze galopantaj ĉevaloj, svingiĝantaj hokeiloj kaj saltanta poloo konfuzis la okulojn de rigardantoj. La sabra dehako prezentita de mongolaj rajdantoj en botoj kaj roboj estas brava kaj alloga. Aro da batalĉevaloj pretergalopis fulmorapide, sabroj trembrilis sub la suno kaj ĉiuj hipotezaj malamikoj — branĉoj, ferringoj kaj tolsakoj — estis dehakitaj unu post alia.

Post la sportkunveno mi flugis de Huhhot al la ajmago (subregiono) Xilin Gol. Rigardante malsupren de sur la aviadilo, mi vidis vastan verdan stepon, sur kiu paŝtiĝas blankaj ŝafaroj kaj galopas viglaj kaj fortikaj ĉevaloj.

En Xilin Gol mi vizitis maljunan paŝtiston Zhongdai de Saihangaobi-komunumo en la Sunite-a Maldekstra Hoŝo (gubernio). Li dresas ĉevalojn por vetkuro jam 20 jarojn. Li konigis al mi multajn sciojn pri ĉevalkonkurso kaj ĉevaldresado de mongoloj.

En ĉevalkonkursado de mongoloj ĉevaloj estas la plej gravaj. La tasko de rajdanto estas nur gvidi ĉevalon por akiri la venkon. Tial oni devas atribui la venkon en konkurso ĉefe al ĉevaldresisto. Zhongdai ĝoje diris al mi: “Dum la lastaj 20 jaroj mi dresis pli ol 40 ĉevalojn, kiuj partoprenis en pli ol dek konkursoj kaj kvarfoje gajnis ĉampionecon.”

Dresi ĉevalojn estas peniga laboro. Ĉiujare, kiam venas printempo, sezono por dresado de ĉevaloj, paŝtistoj kolektas ĉevalojn, tondas al ili kolharojn kaj vostonojn, stampas ilin kaj kastras virĉevalojn. Post tio komenciĝas la dresado de eksplodemaj ĉevaloj, kio estas laciga kaj



*Paŝtistoj dresas ĉevalojn.*

iom danĝera laboro. El la unuapaŝe dresataj ĉevaloj oni elektas kelkajn bonkvalitajn por plua dresado. Unue oni grasigas ĉevalojn per furaĝo, sed poste oni ĉiutage nutras ilin nur per malmulte da furaĝo kaj trinkigas al ili iom da akvo, lasas ilin longe ŝnurligitaj al palisoj, nutrante ilin per nenio. Krome, paŝtistoj ĉiutage devas rajdi sur ĉevaloj por trotigi ilin, por ke ili ŝvitu. Post du monatoj la abdomeno de ĉevaloj malgrandiĝas kaj ilia graso transiĝas iom post iom al la dorso kaj gluteo, tiel ke ili fariĝas sveltaj bonaj ĉevaloj kun larĝa dorso kaj grasa gluteo. Nur tiaj ĉevaloj povas kuri rapide kaj longe. La unujaraj kaj dujaraj dresitaj ĉevaloj povas partopreni nur en konkursoj por ĉevaletoj. Nur kiam ili atingas la aĝon de tri jaroj, ili rajtas partopreni en tiuj por plenkreskaj ĉevaloj. Tiu ĉevalo, kiu estas bone dresita, havas esperon gajni la ĉampionecon en konkurso.

Dum dresado de ĉevaloj, la dresistoj jam komencas elekti rajdistojn por siaj ĉevaloj, por ke ili konatiĝu kun la ĉevaloj. La rajdantoj devas esti gejunuloj, malpezaj, viglaj kaj lertaj en rajdo. La mongolaj infanoj plejparte ellernis rajdi en la aĝo de 5-6 jaroj. Por malpezigi la ŝarĝon de vetkura ĉevalo, la rajdistoj

ĉiam rajdas sensele kaj nudpiede. Tial, elektado kaj kulturado de bonaj rajdistoj ne estas pli facilaj ol dresado de ĉevaloj. Ankaŭ tio estas tasko de la dresistoj.

La ŝato de mongoloj al ĉevaloj estas multe spegulita en la kultura vivo de la mongola nacieco. La mongolaj tradiciaj dancoj, kiel Sabra Danco, Ĉevala Dresisto, kun rapida ritmo kaj belaj kaj viglaj movoj montras la fortecon kaj bravecon de la mongoloj. Ĉevalkapa kordinstrumento estas la plej ŝatata muzikilo de la mongoloj. Laŭdire la unua tia muzikilo estis farita de iu paŝtisto el femuralo kaj kriroj de sia mortinta ĉevaleto por ĝin memori. Per la muzikilo oni pavas ludi tre dolĉan, agrablan, mallaŭtan kaj profundan melodion, kiu sentigas la aŭskultantojn kvazaŭ en senlima stepo.

Kvankam la mongoloj tre ŝatas ĉevalojn, sed kelkiam ili ne domaĝas la bestojn. Ĉasado estas ilia tradicio. Laŭdire Ĝingis-Han iam diris al siaj filoj: “Trejnado de sieĝĉasado estas devo por militistoj.” Nun paŝtistoj sur la stepo de la Interna Mongolio ofte organizas tian ĉasadon, rajdante surĉevalo kun ĉaspafilo sur la dorso kaj kun ĉashundoj. Iam, por persekuti unu leporon, ili eĉ lacigis sian ĉevalon ĝismorte.



## “ESPERANTO KAJ LA TRIA MONDO” EN LA FRANCA LINGVO

Tre gravaj estas viaj analizoj pri la utiliĝo kaj evoluo de la lingvo. Daŭre batalu por ke ĝi restu simpla kaj regula kaj riĉa pro vere internaciaj aldonadoj. Ankaŭ viajn insistojn pri la porscienca kaj teknika utilo de Esperanto mi sciigas ĉirkaŭ mi, eĉ en neesperantistaj rondoj. Tiuteme utilos scii pli precize, kiuj fakoj estas la plej urĝaj, ĉar kompreneble oni ne povas atingi, post kelkaj monatoj, verkaron priscienca tiel imponan, kiel la jam haveblan beletran, kulturan k.t.p. Mi jam tradukis franclingven la artikolon de Zhang Qicheng “Esperanto kaj la tria mondo” (en la maja n-ro de EPC) por sciigi la gravecon de la problemo en universitataj kaj ankaŭ en kelkaj triamondaj medioj.

Mi legas vian gazeton tuj post ricevo, kaj ankaŭ plaĉas al mi konstati, ke vi ĉinoj celas materian progreson por disdoni al viaj kunloĝantoj sufiĉan nutraĵon kaj pli altan

klerecon kaj vivnivelon, kaj vi atentas ankaŭ la tradiciajn valorojn, kiujn vi ricevis de viaj prauloj. Ni kreos nur feran, eĉ atombomban mondon, se ni ne donas al la junularo valoran idealon de sindonemo al la paco kaj la libero de ĉiuj popoloj.

Kiam vi uzas novajn vortojn necesajn por esprimi objektojn aŭ realaĵojn malbone konitajn t.e. de eŭropanoj, ĉu vi povas doni klarigojn pri ili, ne nur per piednotoj? En ĉiu numero de EPC, eltirante kelkajn novajn aŭ malnovajn sed azidevenajn vortojn por formi ian glosaron, iom post iom vi pliriĉigos, pliklarigos, pli internaciigos nian lingvon. Tio precipe valoras, kiam vi raportas pri nacimalplimulto, ankaŭ valoras por vortoj afrikdevenaj, k.t.p. Tio donos plenan signifon al la diraĵoj de s-ro Zhang Qicheng “Ĉerpi bonajn elementojn el la lingvoj de Azio kaj Afriko . . . por fari kontribuon al Esperanto”. (el la jam citita artikolo)

Mi tre gratulas al vi pro la perfekta uzado de nia lingvo laŭ la plej simpla sed aŭtentika maniero, al kiu vi sopiras same kiel multnombraj geesperantistoj tra la tuta mondo.

de **LÉON GOUDE** (Francio)

## LI FARIĜIS NOVA HOMO

Kiam mi eklegis la artikolon “En kaj ekster la malliberejo” (EPC 11/82), mi imagis ke ĝi estus sola, viva dokumento pri malliberejo. La dua parto de tiu artikolo “Edziĝa ceremonio de trompisto” tre emociis min. La grandaj penoj de la ĉirkaŭaj homoj de li faris lin nova homo. Kiam la malbonaj faroj de geknaboj multe problemigis ankaŭ en Japanio, tiu artikolo faris grandan impreson. Mi deziras tiajn kortuŝajn rakontojn.

Plie, la mapo “Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero” utilas al mi, ĉar mi povas scii iun lokon. Tamen, en la mapo ne estas montrataj ĉiuj lokoj. Kial? Ekz., la loko de “Fiŝkaptistoj sur la rivero Songhua” de n-ro 11 ne estis montrita. Povas esti, ke al ĉinoj la nemontritaj estas famaj lokoj. Sed por ni alilandanoj ne estas tiel, kaj ankaŭ por alilandanaj abonantoj. Mi deziras, ke ĉiuj lokoj menciitaj en iu numero estu montrataj en la mapo en tiu numero.

de **MATSUNO YUTAKA**  
(Japanio)

## PUBLIKIGU LA ARTIKOLON PRI . . .



**Tarifo:** 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promeso faritaj en ili.

\* Kuracistino deziras korespondi kun ĉinino: M.J. Line, Boulogne Esperanto, 34 rue de Beaurepaire, 62200 Boulogne-sur mer, Francio.

\* Sorban Daniella, Lunga 6, Singeorgiu de Dadure 3280, Fud. Mures, Rumanio, dez. kor. tutmonde kaj interesiĝas pri p.m., b.k. kaj diskoj.

\* Mathias Mannel (16-j.), Freischutzstr. 9, 8046 Dresden, GDR, volas koniĝi kun iu kaj al iu skribi en Esperanto.

\* Grazyna Pieprzak, 41-800 Zabrze, ul. Stalmacha 15a/7, Polland, vol. kor. kun esperantist(in)o el Ĉinio.

\* Usona presisto dez. kor. pri arto, muziko, k.a. Tom Bentley, RR1 No. 249, Waitsfield, VT 05673, U.S.A.

\* Medveczki Gabor, Debrecen, Ibolya u. 9, 4027, Hungario, dez. kor. kun juna korespond-amiko el Ĉinio.

\* Szabados Pal, Budapest, Arpad



Mi ĵus legis la artikolon nomatan "Vortfaradoj de Esperanto kaj la ĉina lingvo" (EPĈ 9/82). Bonega verko ĝi estas, tre interesa, inform-plena kaj legebla/leginda. Tre plaĉas la multaj ekzemploj.

Mi petas ke vi kompleze publikigu aliajn similajn artikolojn pri la du lingvoj — "kompara lingvistiko pri la ĉina lingvo kaj Esperanto". Tre plaĉus al mi legi artikolojn pri la sintakso de la ĉina lingvo kompare al tiu de Esp-o. Eble serion da artikoloj lingvistikaj vi publikigos en EPĈ, kaj poste eldonos ilin kiel broŝuron.

Tio estus bona por la interkomprenado inter la gesamideanoj tutmonde kaj estus valora kontribuado al la lingva scienco mem.

de JOHN THOMSON (Kanado)

### MI ABONAS LA GAZETON EPĈ

En la jaro 1982 okazis Esp-ekspozicio en la urbo Augustburg (FR Germanio) kiun mi vizitis. Unuafoje mi vidis tie broŝurojn, leterojn kaj bildkartojn preskaŭ el ĉiuj landoj de la terglobo, ankaŭ el la fora Ĉinio. Tiam mi aĉetis kelkajn lernolibrojn kaj komencis lerni

la lingvon per memstudo. Mia intereso pri Esp-o kreskis de tago al tago kaj en nur mallonga tempo mi jam povis legi per helpo de vortaro preskaŭ ĉion. Ĝi estis granda ŝatokupo por mi kiel pensiulo.

Nun mi abonis la faman gazeton EPĈ, kiu al mi tre plaĉis. Krome ĝi estis por mi ankaŭ tre utila en mia lernado kaj nun ĝi estas mia plej aminda legaĵo kaj kun granda sopiro mi atendas ĝin ĉiumonate. Pro tio mi dankas vin tre kore, kaj mi promesas al vi, ke mi restus via abonanto tiel longe, kiel mi vivas. Mi estas nun 76-jara kaj mi havas nur unu deziron — mi volus viziti Ĉinion.

de PAUL SPIES (FR Germanio)

### KOLORAJ BILDOJ ESTAS TIOM ALLOGAJ

La koloraj bildoj kaj fotoj estas tiom belaj kaj allogaj, ke mi ne povas satrigardi ilin. Ĉu tiuj fotoj de naturaj pejzaĝoj, ĉu la fotoj de via popolo tra Ĉinio. Per unu vorto, via revuo ne nur estas plaĉa por esp-istoj, sed ankaŭ ricevas laŭdojn de ne-esp-istoj pro ĝiaj brilaj fotografajoj. Ne estu forgesitaj ankaŭ la belegaj pentraĵoj konstante aperan-

taj sur la dorsflanko de la revuo, mi fieras pro la posedo de ĉinaj pentraĵoj pere de EPĈ.

G. A. (Irano)

### KIOM DA HOMOJ, TIOM DA GUSTOJ

Kompreneble ĉiu leganto de EPĈ rajtas elekti temojn aŭ rubrikojn laŭ sia propra gusto. Oni bone scias la diron: "Kiom da homoj, tiom da gustoj." Tial mi komprenas la intereson de s-ro B. Pabst (EPĈ, n-ro 7/82), kaj eĉ mi konsentas, ke li pravus pri ĉinaj respondoj al hodiaŭaj mondproblemoj. Mi ankaŭ opinias, ke EPĈ devas sciigi la legantojn pri ĉiuj aspektoj de la ĉina vivo inkluzive de sporto, kiun s-ro Pabst ne preferas, tamen aliaj ĝin amas. Mi pensas, ke la redakcio saĝece dozas la materialon. Aliflanke mi ne konsentas kun s-ro Pabst pri tio, ke la revuo devas aperigi malpli pri Esperanto-Movado, ĉar ŝajnas al mi, ke plenumante la deziron de s-ro Pabst, EPĈ ne plenumos unu el siaj celoj, kiu estas partopreni nian Movadon kaj disvastigi tra la mondo nian lingvon, cetero ĝian lingvon ankaŭ.

de G. R. CORRÊA (Brazilo)



Fejededem. Ufa 22.V/4, H-1023, Hungario vol. kor. kun geedzoj pri vojaĝo, historio kaj fotografado.

\* Ĉinaj esperantistoj estas petataj sendi grandnombre poŝtkartojn kun bildoj por subteni nian Esp. agadon. Adr.: s-ano Campagna MM, Box 80-Scacio B, Ottawa, Ont. Canada KIP 6C3.

\* Membroj de Poresperanta Societo Sarajevo en Jugoslavio dez. kor. kun azianoj kaj aliaj:

— Grbo Smail (kursgvidanto 42-

j.), ŝatokupoj: foto kaj kino-amatoreco, pm, bk, vojaĝoj, lingvoj, numismatiko, muziko . . .

— Risticevic Svjetlana, mezlernejanino, 16j.

— Ilic Vesna, gimnazianino, 17j.

— Kafedzic Tatjana, gimnazianino 17j.

— Damnjanovic Sinisa, finita studento 27j.

— Bjelica Milenko, policisto, 25j.

— Jakovljevic Senija, laboristino 32j.

— Velic Hajra, oficistino 20j.

— Suta Esad, ekonomisto 24j.

— Prnjavorac Samir, elementlernejano 13j.

— Prnjavorac Nerma, elementlernejano, 11j.

Skribu al adreso de kursgvidanto: Grbo Smail, ul. Vrbovska, 50, YU-71000 Sarajevo.



## LA EDZON-BATA FESTO DE HINDIO

En multaj lokoj de la hinda kamparo ĉiujare okazas la tradicia Edzon-bata Festo. Kutime la edzinoj devas esti obeemaj al la edzoj, sed en tiu tago ili havas rajton bati sian edzon per bambua stango. La festo ekzistas jam plurajn jarcentojn.

En tiu tago la virinoj portas siajn plej belajn vestojn, ĉiu kun bambua stango preskaŭ du metrojn longa en mano por ekago. Poste iliaj edzoj, tenante bov-ledan ŝildon, ekkantas kaj ekdancas ĉirkaŭ ili. De tempo al tempo la viroj insultas la viri-

nojn, kiuj nur ridetas kvazaŭ ne aŭdinte tion. Je la ordono pri la ekbato, la virinoj ĉirkaŭas la virojn kaj pelas ilin en "edzon-batan cirkon", tiam ĉi tiuj genuiĝas kaj levas la ŝildon super sian kapon kaj la virinoj ekbatas ilin senkomplete. La aktivado daŭras la tutan tagon.

Ĉe la komenco la virinoj batas po unu viron kaj poste ajnaj. Iuj ŝildoj rompiĝas de la batado kaj la apude rigardantaj fraŭloj ĝojkrias pro tio, tiam la edzinoj fariĝas ankoraŭ pli energiaj en batado. Ĉiu cirklo havas unu juĝanton, kiam li trovas, ke iu viro ne povas elteni la baton, li ordonas, ke la virino mildigu sian baton. Efektive la edzinoj estas kompatemaj, kvankam iliaj edzoj estas tiranaj. Ĝuste pro tio, neniu edzo mortis de la batado en la pasintaj jarcentoj. La aktivado daŭras ĝis vespero, kiam doktoroj alvenas kuraci la negravajn vundojn de la viroj.

Post unu nokto la edzoj restarigas sian regan pozicion kaj la edzinoj devas obei ilin kaj elteni maljustaĵojn. Ĉi tiuj povas venĝi sin nur en la venonta jaro.




Ilustrita de Zhang Dayu


## INSULO DE GRANDEGULOJ



En la vasta Kariba Maro troviĝas neatentata insulo Martiniko. Ĝiaj indiĝenoj ĉiuj estas grandeguloj. La viroj altas ĝenerale pli ol 190 centimetrojn kaj la alteco de la virinoj superas 174 centimetrojn. Oni rigardas la virojn kun alteco de malpli ol 180 centimetroj kiel nanojn. Estas tre mirinde, ke ankaŭ alilokoj povas fariĝi pli altaj post kelka tempo da restado sur la insulo. Pasintjare iu brazila zoologo faris







tri-monatan esploradon sur la insulo. Ĉe la reveno al sia lando li rimarkis sin pli alta je kvar centimetroj. Iu maljuna brita vojaĝisto plialtiĝis je tri centimetroj post unu-monata restado sur la insulo. Por malkovri la sekreton, sciencistoj plurfoje esploris la insulon kaj trovis, ke la insulo subtere rezervas multe da radioaktivaj mineraloj influantaj la endokrinan sistemon de homo.

## GRANDA FENDA VALO

La Granda Fenda Valo de Orient-Afriko komenciĝas de la Morta Maro de Jordanio en la nordo kaj etendiĝas suden tra Mozambiko ĝis la fundo de la Hinda Oceano. La totala longeco de la valo estas 6 500 km. Ĝi kruciĝas kun la ekvatoro trairanta Kenjon, pro kio la lando ricevis la interesan nomon "Orient-Afrika Kruco".

Estas klare videblaj la deklivoj kaj fundo de la valo. Ambaŭflanke



Ilustrita de Zhang Dayu

## INTERESA FOIRO DE FRAŬLOJ

Ĉiusemre (ĝenerale en la fino de julio) iu hinda vilaĝo okazigas interesan foiron, en kiu oni vendas nenion alian ol fraŭlojn.

Dum la foira tempo svarmas tre multaj homoj, inter kiuj troviĝas la elektantaj fraŭlinoj kaj iliaj parencoj, la vendotaj fraŭloj kaj iliaj parencoj. La foirejo estas movoplena de mateno ĝis vespero kaj la foiro daŭras plurajn tagojn. Post la fermiĝo de la foiro ĉ. dumil paroj da gejunuloj okazigas edziĝan ceremonion. Tiam la foirejo saturiĝas de festa atmosfero.

Anstataŭ partopreni en intertraktado la vendotaj fraŭloj devas resti en tendo nemalproksime de la foirejo. Pri la doto marĉandas iliaj parencoj. Antaŭ la interkonsento la fraŭloj ne rajtas rigardi sian fianĉinon, kaj tion oni permesas nur post la interkonsentiĝo.

Tiu malofte videbla foiro prezentas moron eble postlasitan de la matriarka socio. Tamen oni tre miras, ke la moro povas daŭri jarmilon.

de ĝi staras groteskaj rokmuroj. La valo estas 50-1 000 metrojn profunda kaj 50-100 km. larĝa. En la fundo estas densaj tropikaj arbaroj, herboriĉaj paŝtejoj kaj torentaj akvofaloj. Tie troviĝas ankaŭ lagoj klaraj kiel spegulo, inter kiuj estas la alkala lago Magadi kun preskaŭ solida akvo. En la lago ne vivas fiŝoj kaj salikokoj, sed ĝi produktas alkalon. Ĉiujare Kenjo eksportas pli ol 100 000 tunojn da alkalo.

## PEJZAĜOJ SUDE DE JANGZI-RIVERO

de LI PING

### 6. nov. NOVA MUZIKAĜO DE "BIVO"

Changzhou 23 kilometrojn longa kaj 7 kilometrojn larĝa estas antikva urbo sude de Jangzi-rivero. Iam oni komparis ĝin kun bivo. La Granda Kanalo kun pluraj fluoj, kvazaŭ kordoj vibrantaj sur bivo, malrapide trapasas la urbon de okcidento al oriento.

Kombiloj estas la plej famaj tradiciaj produktaĵoj de Changzhou. Ĝia produktado havas historion de pli ol 1 500 jaroj. La kombilo estas ne nur vivbezonaĵo, sed ankaŭ ornamaĵo. En iu nova usona filmo la heroino portas kiel ornamaĵon sur sia brusto kombileton de Changzhou duflanke kun maldikaj dentoj. Tia eleganta ornamaĵo furoras en Eŭropo kaj Ameriko en la lastaj jaroj.


Antaŭ centoj da jaroj, por flati al imperiestroj lokaj oficistoj de Changzhou ĉiujare tributis al ili altklasajn eburajn kombilojn. Nun en la Imperiestra Palaco de Pekino ankoraŭ konserviĝas eburaj kombiloj de Changzhou uzitaj de la

imperiestra patrino Cixi. Tiam du tutaj stratoj de Changzhou sin okupis pri farado de kombiloj.

La kombiloproduktado de la urbo havas kelkdek procedojn, kiujn oni observas eĉ nun. La turistoj, kiuj vidis la faradon, senescepte admiris la eminentan teknologion de la tieaj metiistoj.

En la pasinteco Changzhou estis malgranda urbo konata nur de malmultaj. Nun, kiel nova industria urbo, ĝi altiras al si atenton de la publiko.

En 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, en la urbo estis nur kelkaj simplaj teksejoj kaj metiejoj. En la pasintaj 33 jaroj la industria produktado de Changzhou ĉiujare kreskis je 13% kaj sume donis al la ŝtato 6.8 miliardojn da juanoj da imposto kaj profito, 7.5-oble de la investaĵo de la ŝtato. Nun la totala industria produktov valoro de la urbo estas 50-oble de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, la po-kapa kvoto de la produktovaloro superis 10 000 juanojn. Ĝiaj industriaj produktaĵoj jam nombras pli ol 3 000



*Fremdlandaj turistoj  
en drakboato sur la  
kanalo*

specojn, inter kiuj ĉ. 200 specoj vendiĝas al pli ol 50 landoj kaj regionoj. Nun en Ĉinio la rapido de Changzhou jam fariĝis simbolo de altrapida disvolviĝo.

La magistrato tre atentis pri plibonigo de vivkondiĉoj de la loĝantoj. Nun preskaŭ ĉie en la urbo videblas malkonstruo de malnovaj domoj, kaj novaj domegoj leviĝis unu post alia en la proksima antaŭurbo. Verdigo de la medio estas bone zorgata en la urbo, kaj iuj famaj teatraj trupoj ofte venas tien por prezentado.

Oni iam komparis la urbon kun bivo, tamen hodiaŭ sur la "bivo" oni ludas ne elegion sed brilan komponicion.

## 8. nov. TAIHU-LAGO

Wuxi estas unu el la famaj ĉinaj turismaj lokoj. Ĝi frontas sude al Taihu-lago kaj okcidente najbaras al Huishan-monto. La Granda Kanalo trafluas la urbon je ĉ. 20 kilometroj kaj formis tie densan akvovojan reton.

Wuxi multe produktas bonspedan rizon. Dank' al favoraj trafikaj kondiĉoj donitaj de la Granda Kanalo la urbo fariĝis centro por kolekti kaj distribui rizon en la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang. Ĝi estis la unua el la kvar ĉefaj rizmerkatoj en Ĉinio. Antaŭ 1949 ĉiujare kolektiĝis tie maksimume du milionoj da tunoj da rizo. La loko ĉirkaŭ Sanliqiao funkciis kiel komerca centro de la urbo pro tio, ke tie la kanalo estis larĝa kaj profunda kaj insulo en la kanalmezo

*En la Argilfigura Fabriko de Huishan*



povis servi kiel grentenejo, antaŭe tie ĉiutage moviĝis amaso da velsipoj plensarĝitaj de rizo.

Taihu-lago kun areo de 2 250 kvadrataj metroj sin trovas inter la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang. Ĝi estas unu el la kvin grandaj dolĉakvaj lagoj de Ĉinio. En la lago punktiĝas multaj grandaj kaj malgrandaj insuloj, kies montoj kune kun tiuj sur la ĉirkaŭaj duoninsuloj nombras 72 pintojn. Antaŭ ĉ. 5 000-6 000 jaroj tie estis malprofunda golfo. La etendiĝo de la delto de Jangzi-rivero iom post iom formis tie la lagon.

Je la sepa matene mi ekveturis per plezurboato "Huguang" en Taihu-lagon tra zigzaga kaj mallarĝa kanaletto, kiam la ĉielo malheliĝis kaj ekpluvetis, tiam la pejzaĝoj vidiĝis kvazaŭ poeziaj bildoj.

En nia boato plejparto de la turistoj estis novgeedzoj pasigantaj sian mielan monaton. En la lastaj jaroj ekfuroris en Ĉinio edziĝovojaĝo. Apud mi sidis paro da novgeedzoj el Jilin-provinco. Ili estas laboristoj en fabriko de elektromotoroj. La edzo estas fortika, dum lia edzino svelta kaj bela. Ja ideala paro. Ili kaj ĝuis la pejzaĝon kaj ameme flustris, forgesante alies ekziston.

Kiam nia boato preterpasis Zhongdu-monton, la lago fariĝis larĝa kaj renkonte al ni leviĝis Sanshan-monto en la akvo. Kiam ni grimpis sur la monton, sereniĝis la ĉielo. La malproksima montaro aspektis kvazaŭ natura muro. Mi staris en pavilono sur la monto kaj estis tiel ravita de la ĉirkaŭa pejzaĝo, ke mi forgesis eĉ tempon. Eksonis la sireno de la boato por veki nin el la distriĝo.

## 9. nov. "MIRAKLA VOJAĜO"

Tre prosperas turismo en Wuxi. En la lastaj du jaroj oni iniciatis novajn aktivadojn por turismo, ekzemple veturo sur la antikva kanalo, transpaso de Taihu-lago, bicikla vojaĝo, resaniga vojaĝo en pitoreskejoj, fiŝhokado k. a. En la venonta jaro oni aldonos laŭplane novan aktivadon "ĉinstila edziĝovojaĝo", kiu kun gusto de orientanoj multe interesos fremdlandajn amikojn. Ĝis nun 600 paroj da gejunuloj jam sin anoncis por pasigi sian mielan tempon en Wuxi.

# VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (5)

En 1981 oni ekfunkciigis turisman veturon sur la antikva kanalo en Wuxi, kaj en tiu jaro pli ol dekmil fremdlandaj turistoj aliĝis al la vojaĝo. En 1982 la nombro de la turistoj duobliĝis. La okcidentaj turistoj nomis ĝin “mirakla vojaĝo”.

Mi havis feliĉon ĝui tian vojaĝon. La boato malrapide trapasis kanaletojn, pontetojn kaj kajojn, tranĉante la spegulitajn bildojn en la kvieta akvo. Juna virino estis lavanta legomojn, kaŭrante sur borda ŝtuparo ŝtone masonita, kelkaj maljunaj fiŝistoj babilis sur lignaj fiŝboatoj, fumante pipon, infanoj petolis sur pontoj kaj iliaj ridoj aŭdiĝis de tre malproksime.

La boato trapasis la faman antikvan ponton Qingning. Vojpgvidisto diris al mi, ke super la kanalo en Wuxi estas sume 16 tiaj pontoj.

La insuleto Huangbudun kuŝas en la kanalo, kie la akvosurfaco estas larĝa kaj boatoj sekvas unu alian. Ja prospera sceno prezentiĝis.

Antaŭ 700 jaroj la ĉina heroo Wen Tianxiang estis kaptita en la batalo kontraŭ invadantoj. Eskortate al Pekino, li haltis survoje en Huangbudun kaj verkis poemon “Trapaso de Wuxi”, en kiu legiĝas:

*“Korŝiron spertas la hero’ jam antaŭ l’  
vivofero,  
en akompan’ la samlandanoj sentas  
eklarmemon.”*

La versoj estas plenaj de malĝojo kaj indigno.

Posttagmeze mi vizitis la Huishan-an Argil-figuran Fabrikon de Wuxi. La argilaj figuroj de Huishan estas tradiciaj popolaj metiartaĵoj, kies produktado havas historion de pli ol 400 jaroj. La artaĵoj ĝuas altan renomon en la mondo kaj vendiĝas en pli ol 60 landoj kaj regionoj.

Oni prenas mitajn rakontojn, popolajn legendojn kaj ĉiutagan vivon kiel temojn por modli la figurojn. Ili kun viveca formo kaj brilaj koloroj havas tre altan artan valoron, inter kiuj “Feliĉulo”, “Longvivulo” simbolantaj feliĉon kaj “Kvar Belulinoj” de la antikva Ĉinio estas multe ŝatataj de la popolanoj.


## 10. nov. EN DRAKBOATO

Drakboato ankris ĉe silenta kajo, kvazaŭ dormante en matena nebulo. Ĝi kun gravuritaj drakoj kaj pentritaj feniksoj havas sian originalan nacian stilon. Ĝi mirigis miajn usonajn kunvojaĝantojn, kaj tiuj kriis per mallerta pekina dialekto: “Bonege! Bonege!”

Kune kun turista grupo el San-Francisko mi veturis de Wuxi al Suzhou per tiu boato. Plejparto de la grupanoj estis maljunuloj, kiuj tamen havas grandan intereson por la vojaĝo. Post la ekveturo aŭdiĝis jen huraado, jen kantado en la boato. Starante sur la boato ili mansvingis al preterpasantaj fiŝistoj, ŝipistoj kaj aliaj turistoj kaj salutis ilin per ĉinaj vortoj ĵus ellernitaj.

Nancy, grupestro kaj prezidanto de la akcepta centro de San-Francisko, diris al mi: “Mi jam trifoje venis al Ĉinio, sed unua-foje veturis sur la antikva kanalo, kio profunde impresis min. La antikva kanalo estas vera fiero de Ĉinio!”

## MAPO DE LA GRANDA KANALO DE ĈINIO



VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (5)



# TURISMA LOKO WUXI

Fotoj de REN LAO kaj LU BINGRONG

Parto de la  
urbo Wuxi



Unu el la kanaletoj en Wuxi





La Granda Kanalo trafluas la urbon Wuxi.



Huangbudun en la kanalo





Ĉi tie la Granda Kanalo fluas en Taihu-lagon.



Multe okupita kajo



Apudrivera familio

# Pentraĵoj de Dong Chensheng

(Bv. legi la artikolon "La Dua Juneco".)





Ribelo kontraŭ  
la Ĉiela Palaco  
(el ĉina mito)



大鬧天宮  
辛酉年  
庚子月  
北京

Danco "Lotus-  
loroj"

Axitiaoyue, fama danco de ji-nacieco





8152